UNESKO

# Kuriero

Oktobro-Decembro 2024



## Reimagataj muzeoj

- “La muzeo agas kiel templo de kredo je la estonteco” Intervjuo kun **Krzysztof Pomian**
- En **Ganao**, movebla muzeo de Nana Oforiatta Ayim
- En **Aŭstralio**, la estonteco sur ekranoj
- Ekspozicio de vivanta heredaĵo en **Ĉinio**

NIA GASTO

Datuma sciencisto **Rumman Chowdhury**: “Ni povus esti enirantaj post-veran mondon”

ISSN 2096-9082

unesco

EL POPOLA ĈINIO
www.espero.com.cn

## Abonu 100% senpage la bitversion.

https://courier.unesco.org/en/subscribe

### Sekvu la lastajn novaĵojn de *Kuriero*

@unescocourier

### Legu kaj disvastigu

Disvastigu kaj reklamu *UNESKO-Kurieron* laŭ Libera Aliro (*Open Access*), laŭ reguloj de UNESKO por publikaĵoj.


**2024 • n-ro 4 • Eldonata ekde 1948**

*UNESKO Kuriero* estas eldonata kvarfoje jare, de la Organizo de Unuiĝintaj Nacioj pri Edukado, Scienco kaj Kulturo (UNESKO). Ĝi antaŭenigas la idealojn de UNESKO, diskonigante ideojn pri internacie gravaj temoj, konforme al sia mandato.

**Direktoro:** Matthieu Guével
**Ĉefredaktoro:** Agnès Bardon
**Redakta kunordiganto:** Chen Xiaorong
**Asista redaktoro:** Katerina Markelova
**Ĉefo pri Socia Komunikado:** Laetitia Kaci
**Asista redaktoro:** Anuliina Savolainen

**REDAKTOROJ PRI LINGVOJ:**
- **Angla:** Anuliina Savolainen (Redaktoro) kaj Gina Doubleday (provlegado)
- **Araba:** Fathi Ben Haj Yahia
- **Ĉina:** Chen Xiaorong kaj Ĉina Traduka Eldonejo
- **Franca:** Agnès Bardon (Redaktoro) kaj Christine Herme (provlegado)
- **Hispana:** Laura Berdejo
- **Rusa:** UNESKO

**Fotoj kaj ilustraĵoj:** Danica Bijeljac
**Kunordigo pri traduko:**
Hélène Menanteau
**Administracia kaj redakcia asistanto:**
Carolina Rollán Ortega
**Produktado:**
Eric Frogé, Ĉefa Asistanto Produktada
**Fasonado:** Jacqueline Gensollen-Bloch
**Kovrila bildo:** © Sylvie Serprix
**Internulo:** Wang Wenjin

**Kovrila bildo:** © Sylvie Serprix
**Kuneldonaj redaktoroj:**
- **Esperanto:** Chen Ji
- **Kataluna:** Jean-Michel Armengol

**Informo kaj kopirajtoj:**
*courier@unesco.org*
7, place de Fontenoy,
75352 Paris 07 SP, France



© UNESCO 2024

Periodaĵo, alirebla en Libera Aliro (Open Access) sub la licenco Attribution ShareAlike 3.0 IGO (CC BY SA3.0 IGO) (http://creativecommons.org/licenses/by-sa/3.0/igo/). Uzante la enhavon de ĉi tiu eldonaĵo, la uzantoj devas observi la priuzajn kondiĉojn de UNESKO-Deponejo de Libera Aliro (Open Access Repository) (https://www.unesco.org/en/open-access/cc-sa). La supra licenco koncernas ekskluzive la tekstojn. Por uzi la bildojn, oni devas peti permeson. La indikoj, uzitaj en tiu ĉi eldonaĵo, kaj la prezento de la donitaĵoj ne implicas esprimon de ia ajn opinio de flanke de UNESKO koncerne la leĝan staton de iu ajn lando, teritorio, urbo aŭ sfero de ties regado aŭ koncerne markadon de landlimoj. La artikoloj esprimas la opiniojn de la aŭtoroj, ne nepre reprezentasla opiniojn de UNESKO, kiu ne respondecas pri ili.



Danke al la grandanima apogo de Ĉina Popola Respubliko.

**Malgarantio:** UNESKO ne garantias la konformon de la Esperanto-eldonaĵo al la originala numero en la ses oficialaj lingvoj de la Organizo.
**La bitversio haveblas senpage ĉe**
http://www.espero.com.cn/
http://esperanto.china.org.cn/
http://uea.org/revuoj/unesko_kuriero
**Supera organizo:** Ĉina Internacia Komunika Grupo (ĈIKG)
**Subtena organizo:**
Universala Esperanto-Asocio
**Eldono:** El Popola Ĉinio
**Prezidanto:** Chen Wenge
**Ĉefredaktoro:** Zhao Jun
**Vicprezidantoj:** Wang Hanping kaj Yu Wen
**Vicĉefredaktoro:** Lin Chongzhen
**Ĝenerala administristo:** Zhao Quanyong
**Aganta ĉefredaktoro:** Chen Ji
**Tradukantaro:** El Popola Ĉinio kaj UEATeamo
**Provlegantoj:** Chen Ji, Mao Zifu, Rafael Henrique Zerbetto, Rob Moerbeek kaj José Antonio del Barrio
Presita de Limigita Kompanio YinchengBeichuang en Pekino
**Kunlaboranto:** Zaozhuang-a Universitato
**Adr:** P.O. Kesto 77, Beijing CN-100037, Ĉinio
**Tel:** +86-10-68996130
+86-10-68996590
**Retpoŝto:** lamondo@163.com
CN 10 - 1711/C ISSN 2096 - 9082
**Prezo:** 6.8 eŭroj

# Enhavo

4 LARĜA ANGULO

## Reimagataj muzeoj

"La muzeo agas kiel templo de kredo je la estonteco" ... 6
Intervjuo kun Krzysztof Pomian

Vojaĝado tra la tempo kaj korpremaj rakontoj ... 9
Hannah McGivern

Memfotado en muzeoj: iom pli ol spegulo ... 11
E. B. Hunter

"La movebla muzeo estas projekto, kie ni lernas tiom kiom ni enportas" ... 14
Intervjuo kun Nana Oforiatta Ayim

Muzeoj reskribas siajn historiojn ... 16
Rachel Felder

Inoj eniras la bildon ... 18
Lucía Iglesias Kuntz

Ekspozicio de vivanta heredaĵo en Ĉinio ... 20
Guo Yi

Bonvenon al la mondo de la morgaŭo ... 22
Caroline Wilson-Barnao

24 ZOMO

Ombroteatro de Jean-François Spricigo ... 24

36 IDEOJ

Ekologiaj koridoroj: ĉu entute bona ideo? ... 36
Menno Schilthuizen

40 NIA GASTO

"Ni povus esti enirantaj post-veran mondon" ... 40
Intervjuo kun Rumman Chowdhury

44 PLI DETALE

Edukado: la kosto de neagado ... 44

UNESKO Kuriero

## Ĉefartikolo

La cifereca revolucio ebligas al ni aliron al la verkaro de la plej gravaj artistoj, ĉiam kaj ĉie. Sed tamen, la plejmulto de la nuntempaj vizitantoj vicatendas sin dum horoj por vidi pentraĵojn aŭ skulptaĵojn, kiujn ili povus trankvile rigardi hejme sur ekrano.

Estas vere, ke la nuntempaj muzeoj ne plu havas multajn komunaĵojn kun la pasintecaj kuriozaĵ-kabinetoj, rezervitaj por malmultaj privilegiitoj. Kiel vivantaj kaj malfermemaj institucioj, ili adaptiĝis konforme al siatempaj teknologiaj kaj sociaj defioj. Pli multe ol nur simplaj ekspoziciitaj vitrinoj por rigardo de vizitantoj, muzeoj iĝis kulturaj kaj ekonomiaj ĉefagantoj, kies altiran forton la urboj bone konscias.

Pli ol tio, la kernaj misioj de muzeoj (konservado de objektoj, esplorado, edukado, ktp.) ne povas esti plenumitaj pere de la interreto, kio estas emfazita en la rekomendoj rilate al la Protektado kaj Subteno de Muzeoj kaj Kolektoj, akceptitaj de UNESKO en 2015.

Muzeoj daŭre restas, pli ol iam ajn, ligoj inter pasinteco kaj nuntempo, lokoj de transdonado inter generacioj kaj deponejo de la kolektiva memoro. Kaj se ili estas prirabitaj kaj detruitaj, kiel okazis en la lastaj jaroj en Afganio kaj Irako, tio ne nur signifas malaperon de objektoj – ankaŭ partoj de la identeco de tiuj landoj estas subfositaj. La klopodoj de UNESKO por helpi al tiuj landoj renovigi siajn damaĝitajn muzeojn estas en akordo kun ĝia vidpunkto.

Se la publiko ankoraŭ nuntempe amasiĝas antaŭ la artaĵoj de la grandaj majstroj, estas ankaŭ pro tio, ke la emocioj, kiuj eliĝas el la verkoj, ne vere palpeblas krom se ni troviĝas vid-al-vide kun ili, en la speciala, unika rilato, kiu establiĝas inter la originala verko kaj ni, kiuj ĝin rigardas. Nur en muzeo oni perceptas tion, kion la germana filozofo kaj arthistoriisto Walter Benjamin nomis "la aŭron" de iu artaĵo: "Ĉi tiu ununura impreso de distanco, kiel ajn proksima ĝi estas."

***Agnès Bardon***
***Ĉefredaktoro***

*-Esperantigis Frank Lappe (Germanio)*



◥ *Interaga videoaplikaĵo Henry VIII Trifold (II) ĉe la ekspozicio* Profundaj Falsaĵoj: Arto kaj Ĝia Dublo *(2021) ĉe EPFL Pavilions, École polytechnique fédérale de Lausanne, Svislando. Vizitantoj povas rigardi atente portreton de la reĝo Henriko la 8-a de Anglio (1491-1547), per du monitoroj montrantaj reproduktaĵojn skanitajn al ultraalta rezolucio.*

Installation produced by EPFL Pavilions in collaboration with the Art Gallery of New South Wales, Australia. Foto: © Catherine Leutenegger

# Reimagataj muzeoj

Ĉu muzeoj estas malaktualaj? Ĉu ekranoj eksmodigis ilin? Tute male. La nombro da muzeoj altiĝis de 22 000 en 1975 ĝis preskaŭ 100 000 hodiaŭ. Sukcesaj ekspozicioj preskaŭ ĉiam estas homplenaj kaj la ĉefaj muzeoj daŭre superas rekordojn de vizitantoj ĉiujare.

La Luvro en Parizo okupas la pinton de la listo, kun ne malpli ol 8.8 milionoj da vizitantoj en 2023, sekvata de Vatikano, la Brita Muzeo, la Metropola Muzeo de Arto en Novjorko kaj la Nacia Muzeo de la Korea Respubliko, laŭ datumoj kolektitaj de *La Arta Ĵurnalo*. Kaj pli kaj pli da urboj volas profiti de la plej granda parto de la influo donita de ĉi tiuj konataj ejoj.

Oni devas diri, ke en la daŭro de nur kelkaj jardekoj, muzeoj spertis profundan transformiĝon. Origine kreitaj por prezenti princajn kaj reĝajn kolektojn en Renesanca Eŭropo al privilegiitoj malmultaj, muzeoj poste fariĝis multe pli demokratiaj. Belartoj kaj historio jam delonge ĉesis esti iliaj nuraj kompetentecoj. Por altiri novajn vizitantojn, muzeoj ne hezitis konvertiĝi al ciferecaj teknologioj, foje radikale transformante spertojn de la vizitantoj.

Kaj eĉ se fortaj debatoj restas pri la reveno de objektoj akiritaj dum la kolonia periodo, muzeoj adaptiĝis por reflekti la zorgojn de la tempo, ĉiam pli malfermante siajn ekspoziciojn al virinaj artistoj kaj reviziante sian kuratorecan aliron en la lumo de aktualaj debatoj, kaj la postuloj de indiĝenaj loĝantaroj.

En 2024, iri al muzeo estas ankoraŭ speciala, vaste aprezata sperto. Estas nenio simila al ĝi.

Intervjuo de
Agnès Bardon
UNESKO

# Krysztof Pomian: "La muzeo agas kiel templo de kredo je la estonteco"

Historiisto kaj aŭtoro de la monumenta trilogio titolita *La Muzeo, Universala Historio* (*Le Musée, une histoire mondiale*), spuras la naskiĝon de muzeoj ĝis la fino de la 15-a jarcento en Italio. Tra la jarcentoj, princaj trezoroj kaj ŝrankoj plenaj je kuriozaĵoj fariĝis sekularaj lokoj, malfermitaj al la publiko kaj kies kolektoj kreas ligon inter la pasintaj kaj estontaj generacioj.

***Oni ofte pensas, ke muzeoj ekestis kun la Eŭropa Klerismo de la 18-a jarcento. Sed iliaj originoj datiĝas de multe pli frue. Laŭ vi, kiam ili ekis?***

La unuaj muzeoj estis kreitaj fine de la 15-a jarcento – hazarde. Donacante kolekton de antikvaĵoj al la Municipo de Romo, Papo Siksto IV celis restarigi la rilataron de la papeco kun la urbo, kiu estis makulita de lia antaŭulo. La ideo de muzeo estis fremda al li. Sed montrite en la Municipa Palaco (Palazzo dei Conservatori), tiuj antikvaĵoj estigis senprecedencan kolekton de sekularaj, paganaj objektoj, apartenantaj al publika ento, do pri kiuj oni atendis, ke ili daŭru senfine kaj estu alireblaj por vizitantoj. Estis eterna celebrado de la gloro de Romio. Inter la itala elito, fascinita de ĉio romia, ĝi stimulis deziron esti imitita. Duoncentjaron poste, tiu publika ento ricevis la nomon muzeon, kiu iam indikis templon dediĉitan al la muzoj.



◥ Kabineto de Kuriozaĵoj, *pentraĵo de Domenico Remps, ĉ. 1690. Kiel antaŭaĵoj de muzeaj elmontroj, la kabinetoj de kuriozaĵoj elmontris eklektikajn kolektojn de raraj kaj valoraj objektoj.*

© Foto SCALA, Florenco – Komplezo de Ministero Beni e Att. Culturali e del Turismo, Dist. GrandPalaisRmn / bildo Scala

***Kial tiu institucio estis kreita en Italio?***

La muzeo naskiĝis en Italio ĉar la monumentoj de la klasika romia antikveco estis ĉi tie kiel nenie aliloke. Kaj, ĉar la sentoj, ke la nuntempo estis malsupera al tiu glora pasinteco – kaj la



© Yohanne Lamoulère / Tendance Floue

*Metropola Muzeo de Arto, Novjorko. La bildo estas ĉerpita de la serio Gardien Party de Valérie Mréjen kaj Mohamed El Khatib, kiu enfokusigas sekurgardistojn en muzeoj ĉirkaŭ la mondo.*

deziro revivigi ĝin – estis pli ĝenerala kaj intensa ol ie ajn aliloke. Ni ankaŭ povas supozi, ke se Siksto IV ne estus farinta tiun komplezon, ĝi estus farita de alia persono. La rapida disvastiĝo de la muzea koncepto en Venecio, Florenco kaj Milano atestas tion.

Ĝis la fino de la 17-a jarcento, la muzeo restis itala institucio, dum Eŭropo norde de la Alpoj estis englutita en religiaj militoj. Ĝi poste disvastiĝis al la ĝermanaj landoj, Britio kaj Francio. Post la franca revolucio, ĝi troviĝis en ĉiuj ĉefurboj kaj grandaj urboj de okcidenta Eŭropo. Ĝi ankaŭ establis kelkajn pontokapojn en Mezeŭropo, Rusio, Barato kaj Ameriko. Ĝia tutmonda disvastiĝo ekis en la dua duono de la 19-a jarcento, kiam eŭropanoj koloniis ĉiun kontinenton.

***Kiel la muzeoj malsimilas la ŝrankojn de kuriozaĵoj aŭ princajn kolektojn, kiuj ekzistis antaŭ ili?***

La estigo de muzeoj en la Eŭropo de Malnova Reĝimo konsistis el la malfermo de princaj artaj kolektoj kaj ŝrankoj de kuriozaĵoj al la publiko – kvankam unue en tre limigita maniero. Poste, tio signifis adapti la arkitekturon de la konstruaĵoj en kiuj ili estis montrataj kaj la manieron laŭ kiu la objektoj estis prezentataj: reklasifiki la kolektojn, kontroli ilin, kaj reguligi la horojn de malfermo kaj la enirprezon. Kaj tio signifis, ke la muzeoj devis dungi kompetentajn personarojn.

> **“La muzeo naskiĝis en Italio ĉar la monumentoj de la klasika romia antikveco troviĝis ĉi tie kiel nenie aliloke**

***Vi priskribis tiun institucion kiel “senutila sed nemalhavebla”. Kiun rolon ludas ĝi en la socio?***

Ekde la 12-a jarcento, eŭropaj socioj ĉesis konsideri la foran pasintecon kiel fonton por siaj modeloj, ekzemploj kaj normoj. Ili ankaŭ ĉesis konsideri la estontecon kiel antaŭdeterminitan. Tio okazis malrapide, kun interrompoj kaj konfliktoj, kaj neegale tra landoj kaj periodoj. Sed estis du periodoj de intensiĝo en ĉi tiu ŝanĝiĝo de jarcentoj en la centro de gravito de la pasinteco ĝis estonteco vidita kiel la verko de la homaro mem – la Renesanco kaj la Klerismo. Per kunigo de kolektoj de naturaj kaj artefaritaj objektoj el la pasinteco por pasigi ilin al malproksima homa estonteco, la muzeo rolas kiel templo de kredo je la estonteco. Estas tiu kredo, kiu donas al la muzeo ĝian signifon.

Ĝi naskiĝis kun la Renesanco kaj ĝi prenis sian lokon en la centro de moderna civilizo kun la Klerismo, kiam eŭropaj socioj ĉesis rigardi malantaŭen kaj fariĝis estontec-orientitaj. Kiel

→

ambaŭ kaj simptomo de tiu ŝanĝiĝo kaj ĝia peranto, la muzeo elmontras historion kaj konsciigas, ke ĝi estas ĉiea. Kiel rezulto vi povas viziti muzeon pri prahistorio, Mezepoko aŭ eĉ la Dua Mondmilito. Plie, la plimulto de la muzeoj estas organizitaj kronologie, ene de geografia, tema aŭ alia kadro.

***Ekde meze de la 19-a jarcento, ni vidas la nombron de muzeoj multiĝi. Kiel klarigus al vi tiun sukceson?***

La rapida kresko en la nombro de muzeoj de meze de la 19-a jarcento pluen estis la rezulto de la transiro de agrikulturo al industrio, de kampara al urba vivo, de socio de ordoj al socio de klasoj, de analfabeteco al klereco, de malabundo de bildoj kaj sonoj al ilia ĉieesto, la progresoj de sekularigo kaj, pli ĝenerale, la rapideco de la ŝanĝoj, kiujn ni perceptas en la daŭro de la vivo, kiuj vigligis la konservadon de la restaĵoj de malaperintaj mondoj favore al estontaj generacioj.

***Kiujn ligojn ili havas kun la historio de la urboj en kiuj ili situas?***

Ekde la 18-a jarcento, la muzeo estas distingaĵo de civilizo. Ĝi okupas centran lokon en iu ajn inda urbo. Ĝi estas unu el ĝiaj pretendoj je renomo, allogante vizitantojn el ekstero kaj kontribuante, pro sia ekzisto mem kaj la eventoj, kiujn ĝi organizas, al la regenero de sociaj ligoj inter siaj loĝantoj. Parizo ne estus tia, kia ĝi estas, sen la Luvro, Madrido sen la Prado, Munkeno sen la Pinakoteko kaj Arles sen la Muzeo Arlaten.

> “Parizo ne estus tia, kia ĝi estas, sen la Luvro, Madrido sen la Prado, Munkeno sen la Pinakoteko kaj Arles sen la Muzeo Arlaten

***Kiun rilaton havas muzeoj kun la tempo?***

Kiel horloĝoj, muzeoj montras la tempon. Sed estas malsama tempo ol tiu de horloĝoj – longa, kvalita, dividita en periodoj kaj ligita al difinita parto de tera spaco. Tempo ankaŭ estas integra parto de muzea praktiko mem. Muzeaj objektoj venas de la pasinteco kaj devas esti pasigitaj al la estonteco en stato, kiu estas kiel eble plej proksima al ilia origina stato, aŭ almenaŭ al la stato en kiu ili estis, kiam ili eniris la kolektojn. Estas pro tio, ke ili estas konservataj en medio, kiu malebligas aŭ malrapidigas la korodan agadon de fizikaj, kemiaj kaj biologiaj faktoroj. Kaj tio estas kial oni restaŭras ilin, por forigi iujn spurojn de tiuj efikoj. Tamen, ĉi tiuj objektoj devas esti montrataj ĉi tie kaj nun, kio ne ĉiam estas kongrua kun la postuloj de konservado. La arto de la kuratoro konsistas en trovo de kompromisoj inter respekto al la pasinteco, la postuloj de la estanteco kaj la limoj truditaj de la estonteco.

***En ĉi tiu frua 21-a jarcento, kiujn rolojn ludas muzeoj en socio? Kiel vi klarigas ilian sukceson, eĉ en regionoj kie ili ne estis bone establitaj?***

La tendencoj, kiuj estis survoje de la meza 19-a jarcento, estis ĉesigitaj pro la du mondmilitoj kaj iliaj postsekvoj, la koloniaj militoj. La reveno de paco reaktivigis ilin, kun intenseco kiu estas supera, ĉar la ritmo de ŝanĝoj akceliĝas kaj tiuj ŝanĝoj nun renversas ĉiun aspekton de sociaj rilatoj kaj la vivon de individuoj. Pro tio la deziro spertata de kreskanta nombro de homoj konservi por niaj posteuloj la vestiĝojn de tio, kio malaperas. Kaj tion oni povas fari nur per kreado de novaj muzeoj aŭ plivastigo de la ekzistantaj. ■

***-Esperantigis Trefflé Mercier (Kanado)***

## La reto de internaciaj muzeoj

**La Internacia Konsilio de Muzeoj (ICOM) estas la sola tutmonda organizaĵo dediĉita al disvolvado de muzeoj kaj la primuzea fako. Fondita en 1946, en Parizo, Francio, subtene de UNESKO, hodiaŭ ICOM enhavas 57 000 membrojn, 120 naciajn komitatojn kaj 34 internaciajn komitatojn. Tra sia historio, ICOM trafis signifajn mejloŝtonojn por muzeoj, inkluzive de la adopto de kodo pri etiko, la bato al kontraŭleĝa kontrabando, kaj la plibonigado de kontraŭkatastrofa preparado. ICOM eldonas “Muzeon Internacian”, revuon reviziitan de kolegoj kaj transdonitan el UNESKO en la frua tempo de la 21-a jarcento, kiu antaŭenigas kompetentecon kaj interŝanĝojn de scioj pri muzeoj kaj heredaĵoj. Nuntempe, ICOM celas plibonigi travideblecon kaj kunlaboradon inter muzeoj, pritraktante nuntempajn defiojn, kiel malkoloniigadon kaj klimatŝanĝiĝon, dum ĝi pledas por la kerna rolo de muzeoj pri faciligo de la estigo de daŭripovaj kaj pacaj komunumoj.**

Hannah McGivern
*Ĵurnalistino, Londono*

# Vojaĝado tra la tempo kaj korpremaj rakontoj

Ĉu ili ofertas 3D-bildojn aŭ plenmergecan virtualan realecon, muzeoj revolucias la sperton de la publiko uzante novajn teknikojn. Sed ne ĉiuj institucioj povas pagi por ili.

Muzeoj estas tempomaŝinoj, kiuj invitas la vizitantojn al proksima renkontiĝo kun la trezoroj de la historio. Sed kio okazas se la muzeo donus al vi la ŝancon esplori la stokejojn, interagi kun artefaktoj, kiuj ne plu ekzistas, aŭ vojaĝi al la origina loko kie antikva objekto estis trovita? Ĉi tiuj estas spertoj, kiujn nun ebligas la ondo de novaj ciferecaj iniciatoj, okazantaj en muzeoj ĉirkaŭ la mondo – kaj interrete.

Dum ĉirkaŭ 200 jaroj en la historio de muzeoj, malgranda etikedo skribita de kuratoro estis "la sola teknologio disponebla" por helpi vizitanton kompreni la objekton antaŭ si, rimarkas Chris Michaels, konsilisto kaj esploristo pri arto kaj teknologio vivanta en Londono. Sed en la lastaj 20 jaroj, estiĝis "momento de eksplodo, kiam subite ne estas nur vortoj, kiujn vi povas meti inter homojn kaj objektojn, sed vasta gamo da malsamaj teknologioj".



Installation view, Art Gallery of New South Wales, Australia. Foto: © Sarah Kenderdine

◥ Pure Land, *instalaĵo de pliigita realeco, de Sarah Kenderdine, Jeffrey Shaw kaj Leith Chan ĉe la Artgalerio de Novsudkimrio en Aŭstralio. Vizitantoj uzas ekranojn de iPad por esplori la murpentraĵojn ene de la Kavernoj de Mogao, Ĉinio.*

## Virtuala realeco

"Rabakiro: 10 Rakontoj", ekspozicio unue okazis ĉe la galerio Mauritshuis en Hago, en septembro 2023, kaj poste montrita ĉe la Humboldt-Forumo en Berlino, uzas la potencon de virtuala realeco (VR) por enprofundiĝi en la kompleksan debaton pri perforte akiritaj objektoj en muzeaj kolektoj. Portante VR-aparaton, spektantoj estas transportitaj al aŭstra salminejo kie la nazioj kaŝis memportreton de Rembrandt prenitan de juda familio, kaj al balia templo, kie soldato portanta la tradician balian ponardon kriso estis mortigita de la nederlanda kolonia armeo. Tiuj samaj objektoj aperas fizike en la galerio kune kun filmo, kiu klarigas fotogrametrion, la teknikon uzitan por konverti 360-gradajn bildojn de la objektoj en iliajn detalegajn 3D-ciferecajn ĝemelojn.

Por la gastkuratoroj, filmproduktista duopo Eline Jongsma kaj Kel O'Neill, VR fariĝas grava rakontilo por montri ke "tiuj objektoj havis vivon antaŭe, ili havis signifon por iu alia," diras Jongsma. "Pere de ĉi tiu historio de ege malegalaj rilatoj kaj foje korpremaj rakontoj, estas vere grave elpreni la spektanton el la tipa muzeo-kunteksto."

O'Neill priskribas la intensegan senton de "samtempeco", kiun publiko eble spertos en Berlino, vidante la Brandenburgan Pordegon post ol observi, tra VR, la napoleonan invadon, kiu prenis la statuon kun bronza kvadrigo el la monumento kiel milittrofeon. "Vi iel spertas la pasinton samtempe kun la nuno."

## Ŝanĝi la estontecon

Muzeoj mem temas pri lernado de la pasinteco por "ŝanĝi la estontecojn, kiujn ni povus imagi", komentis Seb Chan, ĝenerala direktoro de ACMI, la nacia muzeo pri ekran-kulturo en Aŭstralio, kiu gastigas kolekton, kiu etendiĝas al kino, televido, videoludoj kaj cifereca arto. "Por mi, tio signifas, ke vi devas akordiĝi kun la nuntempa kulturo, kiu →

nun estas neforigeble kunligita kun ciferecaj amaskomunikiloj, ret-kulturaj amaskomunikiloj kaj la teknologioj kiuj subtenas ilin."

ACMI aktive ekspozicias, kolektas kaj konservas originale ciferecajn formatojn, kiel VR, por la estonteco. Ĝi ankaŭ difinas sin kiel "multiplatforman muzeon" kun misio servi al la publiko rete same kiel surloke en Melburno. La hibrida sperto estas kaptita en la *Lens*, kartona disko kun mikroblato, kiun vizitantoj povas kuntuŝigi al la de ili ŝatataj ekspoziciaĵoj en la muzeo por poste esplori hejme. "Ĝi estas kaj memoraĵo pri la vizito kaj funkcia objekto, kiu permesas al vi daŭrigi vian vizitan vojaĝon kun ni," diras Chan. Homoj aldonis pli ol 15 milionojn da objektoj al siaj virtualaj kolektoj ekde kiam la aparato estis lanĉita, en 2021.

## Civitanaj kuratoroj

Esplorprojekto kiu kostis 5.6 milionojn da pundoj ĉe la Universitato de Glasgovo en Skotlando, volas plue vastigi la ideon de "civitanaj kuratoroj". Financata de la brita registaro, la projekto Muzeoj en la Metaverso disvolvas prototipan ciferecan platformon, kiu gastigos centojn da 3D-modeloj de artefaktoj skanitaj el skotaj muzeaj kolektoj. Dum la averaĝa muzeo povas ekspozicii nur 10 procentojn de siaj objektoj al la publiko, "VR forigas la limojn de la ekspozicia spaco," diras la partnera esploristo Fergus Bruce.

La celo estas provizi VR-sperton, kiun "ciferecaj vizitantoj al la retejo de muzeo ne povas sperti," diras Bruce. Uzantoj povos "manipuli kaj kuratori" historiajn objektojn el la partoprenantaj muzeoj ene de virtualaj medioj laŭ sia elekto. La platformo funkcios "ambaŭvoje", permesante al homoj krei kaj dividi novajn VR-enhavojn same kiel konsumi ilin. Publikan version oni atendas en printempo de 2025.

Estas nur unu malavantaĝo: la prezo. Multaj institucioj ne povas pagi por multekostaj VR-aparatoj kaj por ilia prizorgado kaj superrigardo. Kompare, movebla pliigita realeco (PR), kiu metas 3D-ciferecajn bildojn sur la realan mondon tra telefona ekrano, "havas multajn avantaĝojn," diras Thanos Kokkiniotis, ĝenerala direktoro de la premiita kultur-vojaĝa aplikaĵo *Smartify*. "PR, laŭ sia naturo, povas esti multe pli alirebla kaj pli komuna."

### Rekomendo de UNESKO rilate al la muzeoj

**Ĝi estis akceptita en 2015 kaj rilatas la protektadon kaj antaŭenigon de muzeoj kaj kolektoj, ilia diverseco kaj la rolo de socio en tia agado. La inspiro venis de landoj kiuj volis agnoski la propran valoron de muzeoj kiel "gardantoj de la heredaĵoj, kiuj samtempe grave rolas en stimulado de kreemo, kaj tiel kontribuas al la materia kaj spirita bonfarto de homoj tra la mondo.". La rekomendo celas helpi al la muzeoj plenumi sian mision, aparte en rilato al prizorgado kaj konservado de heredaĵoj, potencigo de kultura diverseco, disvastigo de sciencaj scioj kaj evoluigo de edukaj agadoj.**

*Smartify* ofertas ret-bazitan PR, kiun uzantoj povas aliri rekte tra sia retumilo skanante QR-kodon, sen la bezono elŝuti aplikaĵon. "Tiam vi povas dividi la aparaton kun amiko kaj ĝui ĝin kune," diras Kokkiniotis. Li priskribas lastatempan PR-partneradon kun la Usona Arta Muzeo *Smithsonian*, kie familioj kuniĝis dum ludado de serĉado de historiaj trezoroj tra la konstruaĵo.

> "VR fariĝas grava rakontilo por montri ke "tiuj objektoj havis vivon antaŭe"

## Spaca vojaĝo

Partneroj povas helpi muzeojn eksperimentadi per la plej novaj teknologioj, sed ili ankaŭ devus esti singardaj pri la "teknologia merkato movata de furoraĵoj", diras Profesoro Sarah Kenderdine, kiu gvidas la Laboratorion por Eksperimenta Muzeologio ĉe la EPFL-universitato en Svislando. Ĝi specialiĝas pri grand-skalaj ciferecaj vidigoj de kulturheredaĵaj materialoj kaj datumoj, kreante 3D-modelojn kaj panoramajn instalaĵojn por ekspozicioj ĉirkaŭ la mondo.

Pasintaj projektoj inkluzivas "interagan spacan vojaĝon" tra la disvastiĝo de budhismo en Azio, bazitan sur kvin jaroj da kampoesplorado mapanta centojn da lokoj. Laboro nun progresas sur la "cifereca ĝemelo" de svisa nacia trezoro, la 10 metrojn alta, 100 metrojn longa panorama pentraĵo de la Batalo de Murten, de Louis Braun. Tio, kio unuigas ĉiujn laborojn de la laboratorio, estas la celo puŝi "novajn manierojn de publika partopreno" en kulturo, diras Kenderdine. "Temas pri trarompi la barilojn ĉirkaŭ fakaj scioj."

Kun siaj vastaj rezervoj de kulturaj objektoj, dokumentoj kaj scioj, muzeoj havas la potencialon "movi la evoluon de unikaj teknologioj, ĉar ili estas unika socia kunteksto," asertas Kenderdine. "Ili estas tiel raraj en ĉi tiu troe komercigita mondo – ili havas aron da fortaj valoroj kaj ili povas stimuli novajn." ■

***-Esperantigis Orlando Raola (Usono)***

E. B. Hunter

*Asistanta Profesoro pri Dramarto ĉe Universitato Washington en Sankta Luiso, Misurio, Usono*

# Memfotado en muzeoj: iom pli ol spegulo

La kutimo foti sin mem antaŭ *Mona Lisa* aŭ la *Stela Nokto* de Van Gogh ekfloris kun la apero de la cifereca epoko. Ĉi tiu praktiko estas tiom disvastiĝinta hodiaŭ, ke ĝi foje ŝajnas esti la ĉefa kialo por viziti muzeon. Ĉu temas pri simpla manifestiĝo de nuntempa vanteco? Ne nur. La muzea memfoto estas ankaŭ maniero proprigi al si artaĵojn kaj igi vizitojn al muzeo pli signifoplenaj spertoj.

© Ismail Ferdous / Fot-Agentejo VU'



Vizitantoj faras memfotojn ĉe la Centro Richard Gilder por Scienco, Edukado kaj Novigado en la Usona Muzeo de Natura Historio en Novjorko.

Amata de influantoj kun milionoj da sekvantoj kaj timata de gardistoj de valoraj artaĵoj, memfoto ĵus fariĝis ofta maniero sperti eksponatajn artaĵojn. Tamen, malgraŭ sia ĉieestanteco, ne ĉiuj memfotoj faritaj en muzeo celas la samon.

Kelkaj el ĉi tiuj ciferecaj memportretoj simple funkcias kiel pruvo, ke oni alproksimiĝis al ikoneca artaĵo. Kiel la plimulto de memfotoj, ĉi tiuj fotografaĵoj utilas nur por montri al spektantaro ĉe sociaj retejoj, kie oni mem sin trovas. Kiam la muzeo kaj ĝia kolekto estas nur fono, la kompono de tia memfoto ne multe diferencas de tiu farita antaŭ iu ajn alia loko. Kontraste, "muzea memfoto" interagas kun la eksponataj artaĵoj laŭ pli rekta maniero.

## Memportretoj

Unue, indas noti ke la difino de "memfoto" ampleksas multe pli ol nuran foton oblikve kaptitan, en kiu la brako de la fotisto elstaras dum ĝi tenas la saĝtelefonon je certa distanco. Kiel multaj soci-retejaj influantoj povas atesti, bastonoj por memfotado, tripodoj kaj tempigiloj ebligas memportreti sin el diversaj distancoj. Kaj kiel multaj renesancaj pentristoj povas atesti, memportretoj apenaŭ estas ekskluzivaj apartenaĵoj al la cifereca epoko. Resume, la ĉefa trajto de memfoto ne estas ĝia kompono, sed la fakto, ke la portretita persono – la "memo" sur la foto – diskonigas ĝin rete.

> "
> **Muzeaj memfotoj malkaŝas la persiston de la fantazio, ke artverko povus iĝi viva**

Muzeaj memfotoj aliformigas tiun ĉefrolantan memon per diversaj ludaj pozicioj, el kiuj ĉiu inkluzivas interagadon kun la eksponata objekto. Unu el tiaj aliformigoj estas meti vivantan korpon tiamaniere, ke ĝi ŝajnu esti parto de la objekto, ekzemple situigi sin mem tiel, ke la propraj brakoj aldoniĝu al statuo, al kiu ili mankas.

Alia speco de muzeaj memfotoj prezentas vizitantojn imitantajn eksponatan artaĵon. Kelkaj vizitantoj efektivigas ĉi tiun imitadon rekreante la artaĵon per siaj propraj korpoj, dum aliaj imitas ĝin per reliefigo de ia hazarda simileco kun la objekto – kiel kiam okazas malkovro de propra sozio en la verko. Tria aliro estas meti duan saĝtelefonon antaŭ la objekto kiel akcesoraĵon, tiel sugestante ke la objekto faras sian propran memfoton.



Publika Havaĵo / Kolekto de la Muzeo Getty


Foto : © Bryan Beasley

◥ *Maldekstre,* Portreto de Junulino *de la nederlanda pentristo Nicolaes Eliasz Pickenoy, 1632, ĉe la Muzeo J. Paul Getty en Los-Anĝeleso (Usono); dekstre, la portreto rekreita de la fotisto Bryan Beasley dum la kvaranteno pro KOVIM-19 en 2020.*

## Ludo kaj Konektiĝo

Fakte, muzeaj memfotoj malkaŝas la persiston de la fantazio, ke artverko povus iĝi viva. De *Pigmaliono* de Ovidio ĝis Holivudaj filmoj kiel *Nokto ĉe la Muzeo*, homoj delonge reagas al arto kaj artefaktoj imagante ke interveno – hidrargo, antikva malbeno, saĝtelefono – povas ekvivigi la eksponatan senmovan objekton. Laŭ multaj manieroj, muzeaj memfotoj estas la ciferec-epoka esprimo de tiu longdaŭra deziro ludi per arto.

> **"Foti sin mem reprezentas la deziron kapti la signifon de travivita sperto**


© Muzeo J. Paul Getty, Kolekto Villa, Malibu, Kalifornio / foto: Elizabeth Hunter

◥ *Luda foto kun la togo-portanta* Statuo de Diokleciano, *en la Artinstituto de Ĉikago (Usono).*

Kiel institucioj profitas de ĉi tiu deziro? Historie, la rilato inter muzeoj kaj vizitantoj kun fotiloj estis neunuforma. Multaj muzeoj malpermesas fotadon kun fulmlumo pro timo, ke lumigo difektos delikatajn materialojn. Aliaj institucioj tute malpermesas fotadon, timante ne nur damaĝon, sed ankaŭ danĝerojn kiel distriĝo, kaj por la fotisto kaj por la aliaj vizitantoj. Sincere dirite, unumetra bastono por memfotado enhavas sufiĉe da detrua kapablo por pravigi la malpermeson.

Tamen, insisti ke vizitantoj renkontiĝu kun la muzeaj objektoj ekskluzive pere de silenta kontemplado riskas aspekti kiel moraliga preceptado kaj pens-superrigardo. Muzeoj jam havas diversajn strategiojn por reteni infanojn kaj turistajn grupojn, kiuj povus ĝeni aliajn vizitantojn. Uzi ekzistantajn strategiojn por la prizorgado de muzeaj memfotoj permesus al institucioj vivigi siajn ekzistantajn kolektojn kun minimuma peno kaj altiri novajn spektantojn alkutimiĝintajn al renkontiĝo kun kulturaj produktoj per interagado.

Aliflanke, oni eĉ ne bezonas fizike viziti muzeon por fari muzean memfoton. Ĉi tiu fenomeno estis aparte rimarkinda dum la pandemio de KOVIM-19. Kun siaj fizikaj kolektoj fermitaj pro kvarantenoj, institucioj kiel la Muzeo Getty en Los-Anĝeleso, Usono, kaj la Ŝtata Muzeo (Rijksmuseum) en Amsterdamo, Nederlando, defiis homojn hejme fari muzean memfoton rekreante siajn plej ŝatatajn artaĵojn per hejmaj objektoj.

Ĉi tiuj defioj estigis milojn da kontribuoj de "virtualaj vizitantoj" kaj kaptis konsiderindan atenton de amaskomunikiloj, kio montris la efikecon de muzeaj memfotoj por flegi la rilatojn kun la publiko kaj kreskigi la ciferecan ĉeeston de institucio kiam fizika kolekto estas nealirebla.

## Preter vanteco

Estas tente enkadrigi novajn spektantarojn, iliajn vizitantajn praktikojn, kaj la ciferecan epokon ĝenerale en toksan kaj memcentritan miksaĵon. Sed la fenomeno de memfotado, en muzeoj aŭ aliaj lokoj, estas multe pli kompleksa ol tiu tropo. En 2023, sociaj psikologoj unuafoje esploris la aferon profunde. En la studo titolita *Bildigi la Vivon: La Rolo de Imaga Perspektivo en Personaj Fotoj*, esploristoj montris ke enmeti sin en la kadron ne estas nur afero de vanteco. Pli ĝuste, fari memfoton reprezentas la deziron kapti la signifon de travivita sperto.

Dum la unua-persona foto, kiu kaptas scenon aŭ objekton, estas ĉefe uzata por dokumenti fizikajn spertojn, la tria-persona bildo, kiu inkluzivas la fotiston, aldonas pli profundan signifon al la okazaĵoj. Kiam la partoprenantoj en la studo rigardis siajn proprajn unua-personajn fotojn, ili nur memoris la fizikajn trajtojn de tio reprezentita, sed kiam ili vidis siajn memfotojn, ili povis rememori la emocian aŭ psikologian signifon.

Do, meze de la kulture ŝarĝita medio de eksponataj artaĵoj kaj artefaktoj, kuraĝigi homojn partopreni muzean memfotadon povas helpi al ili personigi, profundigi, kaj konservi la signifojn, kiujn ili trovas dum vizitado al multnombraj muzeoj, kiujn la mondo proponas al ni. ■

***-Esperantigis Pablo León (Argentino)***

Intervjuo de
Anuliina Savolainen
UNESKO

# Nana Oforiatta Ayim: "La movebla muzeo estas projekto, kie ni lernas tiom kiom ni enportas"

En Ganao, la movebla muzeo de Nana Oforiatta Ayim alportas arton al lokoj, kie la ĉiutaga vivo okazas, de fiŝkaptaj havenoj ĝis bazaraj placoj. La atestoj kaj objektoj montrataj de la vizitantoj kontribuas al pli vasta projekto por mapado de la kultura pejzaĝo de la afrika kontinento, samtempe prezentante alternativon al la okcidenta muzea modelo. Intervjuo kun Nana Oforietta Ayim, ganaa verkisto, kultura historiisto, kuratoro kaj kinreĝisoro.

***Via projekto de movebla muzeo atingis internaciajn novaĵojn en 2016, kiam la konstruo, granda kiel kiosko, ekvojaĝis tra Ganao. Kio inspiris tiun nekutiman ekspozician modelon?***

Mi ofte partoprenis en la lokaj ganaaj festivaloj dum mia tuta vivo; ĉi tiuj malfermaj, inkluzivigaj, nekredeblaj iniciatoj entenas dezajnon, arton, poezion kaj ĉiun alian arton. De tio mi sciis, ke arto kaj kulturo havas grandan resonon en miaj komunumoj kaj kulturo, sed ĝi ne estis tradukita en la nuntempan artan sferon. La Nacia Muzeo de Ganao estis fermita dum iom da tempo kaj, krome, ĝi tro imitas la modelon de okcidenta etnografia muzeo.

Mi komencis ĉirkaŭrigardi konstruojn, kiuj estas malfermaj kaj inkluzivigaj. En Ganao estas kiosko ĉe ĉiu angulo de ĉiu urbeto, vilaĝo aŭ urbo, kaj ĉi tiuj kioskoj estas uzataj por ĉio: ili povas gastigi mekanikan laborejon, oportunan vendejon aŭ frizejon. Iel homoj sukcesis uzi la konstruon de ĉi tiu arkitektura tipologio kaj malfermi ĝin por ĉiu tipo de uzo. Do kial ne havi muzeon en kiosko?

Mi kunlaboris kun la juna arkitekto DK Osseo-Asare por krei la kioskan muzeon. Ĝi unue estis provita en 2016 ĉe la festivalo *Chale Wote* - arta evento okazanta en la kvartaloj de Jamestown, en Akro, kun la partopreno de multaj artistoj kaj artaj institucioj. En la kiosko, fotografaĵoj de la ganaa fotisto Ofoe Amegavie estis prezentitaj kune kun aliaj artefaktoj.

Iam, tradicia scio-konservanto – speco de mediumo – preterpasis, blankvestita, sekvata de homoj kantantaj kantojn. Ĉi tiu tiel nomata "pastro de la akvo" partoprenis en la tradicia puriga festivalo okazanta en Akro samtempe. Li diris, "Ho, via muzeo estas sanktejo. Ni faros kelkajn ceremoniojn por la akvo, por la loka laguno kaj por ĝia purigado". Kaj poste homoj venis por fari ĉi tiujn ceremoniojn. La celo de la muzeo fariĝis tre dinamika kaj tre viva. Tio fariĝis speco de markilo de la movebla muzeo: ni eble havas niajn planojn, sed kiam ni alvenas al loko la planoj ŝanĝiĝas ĉar homoj alprenas ĝin kiel sia proprieto.

> "Mi vidas la moveblan muzeon kiel daŭran ekzercon de konstruado de rilatoj

***Kiel la modelo evoluis tra la tempo?***

La lanĉo en 2016 estis granda sukceso, do mi pensis, ke mi devas vojaĝi kun ĉi tio ĉar evidente ĝi estas io, kion homoj deziras kaj pri kio ili ekscitiĝas. Tiel komenciĝis la moveblaj muzeoj. Ni portis la muzeon al ĉiuj dek regionoj de Ganao, kaj plie – de Senegalo ĝis la Venecia Bienalo en 2022. Kaj ĝi daŭre vojaĝas. La konstruo evoluis de kiosko al diversaj modulaj konstruoj – ĉiufoje kiam ĝi vojaĝas, ĝi havas malsaman vivformon, kiu reflektas la celon. La movebla muzeo konsistas el objektoj, fotografaĵoj, pentraĵoj, filmoj kaj



© Nana Oforiatta Ayim

*La Movebla Muzeo en Akro, Ganao*

buŝaj rakontoj kolektitaj de ĉiu regiono kaj eksponitaj en tiuj regionoj. Mi vidas ĝin kiel daŭran ekzercon de konstruado de rilatoj.

***Kiuj estas la vizitantoj kaj kion ili serĉas?***

Jen kio tiom plaĉas al mi pri la movebla konstruo – ke ĝi estas malferma al ĉiuj, ne nur al homoj, kiuj jam amas arton. Kutime ni starigas ĝin en centra loko kiel bazara placo, do estas multe da homoj, de infanoj ĝis plenkreskuloj, kiuj vendas kaj aĉetas; de instruistoj ĝis fiŝkaptistoj. Estas multaj demandoj kaj konversacioj. Foje estas suspekto pri kion ni faras kaj kial, kaj tio kondukas al pli da konversacioj – ĉio estas tre bela. La movebla muzeo estas mia plej ŝatata el ĉiuj projektoj, pri kiuj mi laboris. Ĝi ne baziĝas sur tradicia aliro al kuratoreco, sed sur humiliga metodologio anstataŭe, ĉar ni lernas tiom kiom ni enportas, se ne pli. Foje ni komisias por verkoj de homoj aŭ aĉetas aŭ pruntas objektojn, ekzemple ili eble alportas al ni malnovajn objektojn transdonitajn de iliaj prauloj. Foje la artefaktoj vojaĝas kun ni al aliaj regionoj. Tio permesas al ni krei paralelojn inter lokoj kaj kulturoj.

***Vi ankaŭ estas la mova forto malantaŭ la* Kultura Enciklopedio*, grand-skala malfermfonta dokumentada kaj arkiva projekto pri afrika kulturo. Kiel la du iniciatoj rilatas?***

La ideo de la projekto Kultura Enciklopedio, lanĉita antaŭ jaroj, estis dokumenti kaj kolekti kulturajn esprimojn tra la kontinento, kun la ideo de diasporo kiel bazo por plua kreado. Mi vidas ĝin kiel alian formon de la muzeo – alian formon de arkivado, de kunhavigo de scioj kaj ankaŭ de kulturo, laŭ maniero kiu estas dinamika kaj senfina.

La du projektoj estas proksime kunligitaj kaj nutras unu la alian: ni fakte relanĉis la Kulturan Enciklopedion en septembro 2024, kun multe da informoj kolektitaj en la moveblaj muzeoj dum la jaroj. Mi ricevis multajn demandojn el aliaj afrikaj landoj pri la modelo de movebla muzeo, dum paralele ni kreas metodologion por ke landoj kreu la enciklopedion en siaj landoj.

***Dum via kariero vi recentrigis afrikajn rakontojn, instituciojn kaj kulturajn esprimojn en la rakontado pri la pasinteco, defiante la ĉefajn interpretojn. Kiel vi rigardas la rolon de la muzeo – okcidenta inventaĵo – en ĉi tiu kunteksto?***

La vorto "muzeo" evidente devenas de la Okcidento. Sed la ideo havi kulturon ene de difinita kunteksto ne origine devenas de la Okcidento. Ni ankaŭ havas niajn proprajn manierojn kaj formojn por transdoni kulturon al aliaj homoj. Projektoj kiel la mia kaj multaj aliaj tra la mondo kreas ian malkonstruon de la longe establita "enciklopedieca muzea modelo". Eble post 50 aŭ 60 jaroj, homoj rigardos malantaŭen kaj diros, "Ĉu vi memoras kiam ili havis konstruojn kiel tiuj, ili estis nomataj muzeoj!" Mi vere pensas, ke okazas ŝanĝo, kaj mi ne kredas, ke sintezaj muzeoj, kiel ili estis iam imagitaj, daŭre ekzistos en la estonteco en sia nuna formo. ■

***-Esperantigis Paolo Omodei-Zorini (Italio)***



© Nana Oforiatta Ayim

*Vizitantoj antaŭ la movebla muzeo de Nana Oforiatta Ayim*

Rachel Felder

*ĵurnalistino pri kulturaj aferoj kaj verkistino en Nov-Jorko, Usono*

# Muzeoj reskribas siajn historiojn

Oni diras, ke historio estas skribita de la venkintoj. La Usona Muzeo de Naturhistorio en Novjorko kaj aliaj muzeoj tra la mondo laboras por ŝanĝi tion. Konsciaj ke iliaj kolektoj ofte reflektas antikvajn sintenojn de koloniismo, ili repripensadas sian rolon kaj aliron.

De kiam oni ĝin malfermis al la publiko, fine de la 19-a jarcento, la Usona Muzeo de Naturhistorio estis populara destino jen por la turistoj jen por la novjorkanoj mem.

Tamen, hodiaŭ la spertoj de la vizitantoj tre malsamas kompare kun tiuj de antaŭ 150 jaroj, kaj ne nur pro tio ke oni kunportas poŝtelefonojn kaj bludentajn aŭskultilojn.

La pasintan januaron la muzeo fermis du grandajn ekspozicihalojn dediĉitajn al la indiĝenaj popoloj. Sep montrofenestroj enhavantaj kelkajn arojn da pecoj ligitaj al tiuj komunumoj, du el ili havaj-devenaj, estis kovritaj tiamaniere, ke nek la vizitantoj nek la laboristoj povus ilin vidi.

Antaŭ nur kelkaj jaroj, novaj klarigaj signoj estis aldonitaj ĉe la enirejo super la dioramo kiu reproduktas la renkontiĝon inter la indiĝenaj ĉefoj kaj la koloniistoj. En ili, skribitaj per grandaj literoj, vizitantoj estas invititaj "rekonsideri la signifon de ĉi tiu sceno".

## Malmoderna perspektivo

Tiuj lastatempaj ŝanĝoj estis diktitaj parte de revizio de NAGPRA, la *Leĝo por la Protektado kaj Repatrujigo de Tomboj de Usonaj Indiĝenoj*, kiu, ekde 1990, devigis usonajn instituciojn redoni la posedaĵojn – kiuj ofte ĉeestas en historiaj muzeoj – al indiĝenaj popoloj kaj komunumoj, kies parto ili origine estis. Aparte de ĉi tiu registara dekreto, muzeoj ĉirkaŭ la mondo ekiris sur la vojon de malkoloniado, reviziante la malmodernan etnan perspektivon de konservado de kolektoj nutritaj de koloniaj reĝimoj.

"Ni rekonas, ke iuj objektoj estis aldonitaj al niaj kolektoj laŭ etikaj normoj, kiujn ni nuntempe konsideras neakcepteblaj," konfesas Sean Decatur, prezidanto de la Usona Muzeo de Naturhistorio. "Necesas, ne nur en tiuj areoj regataj de tiu leĝo, sed ankaŭ en tiuj nekovrataj de NAGPRA, agnoski tion kaj korekti tiujn misfarojn de la pasinteco."

"Muzeoj konsciiĝis pri sia respondeco ne nur rilate al sia tuja medio, sed ankaŭ al la internacia komunumo," diras Elizabeth Merritt, vicprezidanto de Strategia Perspektivo kaj fondinto-direktoro de la Centro por la Estonteco de Muzeoj, profesia asocio kiu estas membro de la Usona Alianco de Muzeoj.

"Ĉi tiuj decidoj estas parto," ŝi aldonas, "de pli larĝa kultura evoluo kiu provas rompi kun la domina diskurso kiu formis kolektadpraktikojn en la lastaj jarcentoj."

Por muzeoj, ĉu ili specialiĝas pri belartoj, ornamaj artoj, historio, scienco aŭ popola kulturo, tiuj korektoj povas preni multajn formojn. Kelkaj alprenas, ekzemple, inkluzivigan aliron al programo, prezentante enhavojn ligitajn al komunumoj kiuj iam estis sub kolonia rego. Tio estas la kazo de la Kanada Belarta Muzeo, en Otavo de la provinco Ontario, kiu pasintsomere inkludis en sia programo retrospektivon de la mohoka artisto Shelley Niro kaj ekspozicion de bidaj faraĵoj faritaj de kanadaj indiĝenaj artistoj.

La Minneapolis-Instituto de Arto, en Usono, aranĝis grupan ekspozicion




*La verko* NDN Art *de Teri Greeves, artisto de la kiova tribo de Oklahomo, Usono, uzante tradiciajn kiovajn bidteknikojn.*

© Teri Greeves / Foto: Dan Barsotti

## UNESKO inaŭguras la mondskale unuan virtualan muzeon de ŝtelitaj kulturaj posedaĵoj

**Ŝtelo, disrabado kaj ŝakrado de kulturaj posedaĵoj estas krimoj. Ili senigas homojn je aliaj historio kaj kulturo, subfosas longdaŭran socian koheron, nutras krimajn organizojn kaj kontribuas al la financado de terorismo. Por intensigi la batalon kontraŭ ĉi tiu plago, Audrey Azoulay, Ĝenerala Direktoro de UNESKO, anoncis la kreadon de virtuala muzeo de ŝtelitaj kulturaj objektoj kadre de la internacia konferenco pri monda kulturo (Mondiacult) de UNESKO, kiu okazis en Meksikurbo en 2022: "Nia celo estas remeti ĉi tiujn verkojn en la atenton kaj restarigi la rajton de socioj aliri al sia heredaĵo, malkovri ĝin kaj identiĝi kun ĝi", deklaris Azoulay dum proklamo de la projekto.**

**Dum jardekoj ni atestas akcelon de atakoj kontraŭ heredaĵoj, kiuj en multaj landoj kaŭzis neripareblan damaĝon. La kresko de ŝakrado estas alarma. La jaraj ciferoj de internacia kunlaboro gvidata de INTERPOL estas nediskuteblaj: 60 arestoj kaj 1 049 objektoj rekuperitaj en 2023. Pro siaj heredaĵa intereso kaj merkata valoro, kulturaj varoj povas interesi kaj etajn krimulojn kaj grandajn krimajn organizojn.**

**La protektado de kultura heredaĵo konservas nian komunan historion kaj nur kolektiva agado povas bremsi la kontraŭleĝan komercon de ŝtelitaj kulturaj posedaĵoj: la batalo kontraŭ ŝakrado estas do respondeco de ni ĉiuj.**

**Por konsciigi la ĝeneralan publikon, kaj precipe junulojn, pri la problemoj rilataj al ŝakrado, kaj faciligi reakiron de ŝtelitaj kaj perditaj kulturaj objektoj tra la mondo, UNESKO, kunlabore kun siaj membroŝtatoj, teknikaj partneroj kaj lokaj komunumoj, realigos ĉi tiun novigan kaj inkluzivigan projekton**

**La dezajno de la platformo estis asignita al Francisko Kéré, arkitekto de Burkino kaj gajninto de la Pritzker-Premio pri Arkitekturo 2022, kiu inspiriĝis de la formo de baobabo, "simbolo de fortikeco kaj esenca arbo en la vivo de multaj afrikaj komunumoj." La unuaj skizoj kaj planoj de ĉi tiu cifereca muzeo estis prezentita la 3-an de oktobro 2023 en la sidejo de UNESKO.**

**UNESKO klarigas, ke vizitantoj esploros virtualajn spacojn samkiel ili farus en fizika muzeo, kun aliro al 3D-modeloj de la objektoj kaj eduka cifereca enhavo, samkiel al rakontoj kaj atestoj de la komunumoj trafitaj de la malapero de la menciitaj havaĵoj.**

**La unua versio de la muzeo, kun proksimume 600 ŝtelitaj kaj perditaj kulturaj objektoj, estos inaŭgurita fine de 2025. En ĉi tiu kunteksto, oni invitis la membroŝtatojn de UNESKO elekti inter kvar kaj dek objektojn, kies perditeco kaj ŝteliteco signife malriĉigis nacian kulturan heredaĵon, por aldoni ilin al la kolekto de la muzeo.**

titolitan *Koroj de Nia Popolo: Indiĝenaj Artistinoj* en 2019; kaj ĉi aŭtune, en la Usona Muzeo pri Naturhistorio en Novjorko, la ekspozicio *La Muzeo Ŝanĝiĝanta* profunde rigardas la historion de la kolektadpraktikoj de la institucio, ĝia pasinta evoluo kaj ĝia nuna stato.

### Aliaj rakontoj

Foje malkoloniadaj klopodoj estas limigitaj al simpla ŝanĝo de nomoj. En Kalifornio, la Muzeo de la Homo de San Diego, konstruita sur praaj teroj de la Kumeyaay-oj, estis renomita kiel Muzeo de Ni en 2020. Kiel indikite en la reklama broŝuro, "la Muzeo de Ni estas spaco dediĉita al diversaj rakontoj kiuj difinas nin, precipe tiuj kiuj estis longe neglektitaj aŭ silentigitaj de superregaj kulturaj rakontoj."

"Ni rigardis la pasintecon kaj rimarkis, ke ni devas ŝanĝi nian aliron al historio, perforto, subpremo kaj regado," diras Steven Loft, vicprezidanto de la fako pri indiĝenaj vojoj kaj malkoloniado de la Nacia Galerio de Kanado. "Ĉar ĉiuj institucioj alfrontas ĉi tiun defion – kaj ĉi tio estis longa procezo – ni devas radikale ŝanĝi la manieron kiel ni prezentas rakontojn. En la kampo de kulturo, ni devas ŝanĝi ĉion el de la bazo."

Pozicioj kiel tiu de Steven Loft fariĝas pli kaj pli oftaj. En Glasgovo, Skotlando, la Hunterian-Muzeo havas "kuratoron de malkomforto", Zandra Yeaman, respondeca pri programo por movi la muzeon el ĝiaj tradiciaj kaj ofte malnoviĝintaj limoj. Skotlando estis precipe aktiva en malkoloniadaj klopodoj tra la projekto *Imperio, Sklaveco kaj la Muzeoj de Skotlando*, registar-financita iniciato kiu planas renovigi la perspektivon kaj enhavon de la kulturaj institucioj de la lando.

### Daŭra ŝanĝo

Dum la tempo pasas, multaj fakuloj pri muzeologio estas optimismaj, ke la movado al malkoloniado venas por resti. Sharon Heal estas direktoro de la Asocio de Muzeoj, brita profesia grupo kiu konsilas al muzeoj kaj iliaj staboj. "Mi esperas," ŝi diras, "ke ĉi tiu fenomeno enradikiĝas en instituciaj praktikoj, ke ili povas montri kuraĝon, respondeci al komunumoj kaj fari profundajn esplorojn por ĝisdatigi kelkajn malnoviĝintajn rakontojn kaj malkaŝi kelkajn kaŝitajn rakontojn. Ili devas rekoni, ke foje ili faris erarojn, ke la kolektitaj objektoj povas esti fruktoj de ekspluatado kaj rabado." ■

***-Esperantigis Maritza Gutierrez (Kubo)***

Lucía Iglesias Kuntz

UNESKO

# Inoj eniras la bildon

Longtempe limigitaj al la roloj de kopiistoj, patronoj aŭ muzoj, inaj artistoj lastatempe ĝuadas pli grandan agnoskon, kiel pruvite de politikoj pri muzeaj akiradoj kaj spacoj rezervitaj al ili ĉe famaj ekspozicioj. Sed malgraŭ la strečoj de multaj institucioj por inigi siajn kolektojn, egaleco estas ankoraŭ malproksima celo.

Verkoj de la hispana pentristino Rosario de Velasco estas ekzponataj ĉe la Nacia Muzeo Thyssen Bornemisza de Madrido; la franca filmistino Agnès Varda estas elmetita en retrospektivo ĉe la Kinoteko de Parizo; kaj la usona koncepta artistino Jenny Holzer estis stelulo ĉe ekspozicio en Guggenheim-Muzeo en Nov-Jorko – ja ne mankas lastatempaj ekzemploj de muzeoj kaj kulturaj fondaĵoj honorantaj inajn artistojn.

Longan vojon ni iris ekde la tagoj kiam inaj artistoj estis ignorataj, primokataj aŭ menciataj nur rilate al siaj partneroj, kiel la franca skulptistino Camille Claudel aŭ la meksika pentristino Frida Kahlo, vaste superombritaj de siaj respektivaj amantoj, Auguste Rodin kaj Diego Rivera.

Tiu nevideblo estis priplendata dum pluraj jardekoj. En 1989, aktivuloj de la feminista kolektivo Guerrilla Girls defiis la Metropolitan Muzeon en Nov-Jorko per siaj afiŝoj demandantaj “Ĉu ili devas esti nudaj por esti ekspoziciataj?”.

La problemo pri pli granda egaleco ne estas nur demando pri principoj; la financa egaleco en la mondo de arto dependas super ĉio de la videbleco kaj agnosko de la artistoj, specife tra individuaj ekspozicioj. La logiko de la arto-merkato diktas, ke ju pli multe artisto estas elmontrata, des pli granda estas ties valoro.

## Plia videbleco

En la lastaj jaroj, tamen, certa nombro da kulturaj institucioj ne ŝparis streĉojn por videbligi inajn artistojn. Tio estas vero pri la Nacia Muzeo de Belartoj en Stokholmo, ekzemple, kiu dum la pasintaj dudek jaroj sekvis politikon celantan pliigi la prezenton de inaj artistoj en siaj kolektoj. “Ni fokusas sur pentraĵoj kaj skulptaĵoj de artistinoj nordaj, precipe svedaj, ekde la 19-a jarcento, kaj ankaŭ francaj pentristinoj ekde la 18-a kaj 19-a jarcentoj”, klarigas Martin Olin, direktoro de la kolektoj ĉe la muzeo. “En la lastaj jardekoj”, li aldonas, “ni akiris ankaŭ verkojn de artistinoj de la antaŭaj periodoj, inkluzive de la itala pentristino Artemisia Gentileschi. Ni ankaŭ klopodas integri la verkaron de nuntempaj artistoj en nia kolekto, cele al kohero.”

En Hamburgo, norda Germanio, el la dudek ekspozicioj listigitaj ĉe la hamburga stacidomo – Nacia Galerio de la Nuntempo, inter 2023 kaj 2025, dek kvar estos destinitaj al virinoj. En Londono, la Tate-Galerio estas delonge komisiita pliigi la diversecon de siaj kolektoj. “En 2021 la kuratoroj formaligis ĉi tiun celon tra nova kolekto-strategio kiu startigas nian aktualan sindevontigon pliigi la reprezenton de inaj artistoj. Ĉi tiu sindevontigo estas klare videbla en la verkoj kiujn ni aktive aĉetas (male al tiuj donacitaj aŭ testamentitaj al ni). Dum la pasintaj kvin jaroj ni akiris pli da verkoj de

> “Tiu nevideblo estis priplendata dum pluraj jardekoj

virinoj ol de viroj. Ĉi tiuj povas esti de inoj kiuj estis nekonataj aŭ tiuj apartenantaj al novaj generacioj, kiel Rachel Young aŭ Kudzanai-Violet Hwami, kiuj aliĝis al la Ekspozicio *Tate* unuafoje”, klarigas Rachel Young, de la londona arta centro.

## Dora Maar superstelulino

En Parizo, la Centro Georges Pompidou ne estas preterlasinda. “Aktuale, 18.53 % de la totala nombro de artistoj reprezentataj en nia kolekto el 120 000 estas inoj, sed ju pli junas la generacio, des pli tiu ĉi cifero ekvilibriĝas (ĉirkaŭ 40% el la vidaj artistoj naskiĝintaj post 1970 kiuj konsistigas nian kolekton, estas virinoj)”, diras Dorothée Mireux el la muzeo de Parizo. “En 2018, la kolekto inkluzivis 1469 inajn artistojn, kio montras pliiĝon je 5.65% en kvar jaroj”. La Centro Pompidou, kiu estis pioniro per mejloŝtonaj ekspozicioj kiel *elles@centrepompidou* (de 2009 ĝis

© Arhivo Alinari, Florenco; Alessandro Vasari



“ **Kelkaj kulturaj institucioj ne ŝparis streĉojn por videbligi inajn artistojn**

*Memportreto de la itala baroka pentristino Artemisia Gentileschi, datumebla inter 1630 kaj 1638. Unu el la plej famaj artistoj de sia tempo, ŝi estis la unua virino allasita al la prestiĝa Akademio de la Artoj pri Desegno en Florenco, en 1616.*

2011) kaj *Elles font l'abstraction* (Inoj en abstrakteco) (2021), igis fotistinon Dora Maar la plej reprezentita ina artisto en sia kolekto, klasifikita la kvina inter la plej ekspoziciitaj artistoj, post la fotistoj Man Ray, Brassaï kaj Eli Lotar kaj la skulptisto Constantin Brancusi.

Aliaj muzeoj evoluigis specifajn iniciatojn por marki kelkajn eventojn kiel la Internacia Tago de la Virinoj. La 8-an de marto, ekzemple, virinoj rajtis viziti la arkeologiejon de Pompejo senpage, aŭ aŭskulti prelegserion organizitan de la Muzeo de Prado en Madrido por diskuti la rolon de virinoj en la muzeaj ĉefverkoj. Ĝia retejo havis specialan paĝon titolitan "Prado Ine". Aldone, la muzeo aktive antaŭenigas la partoprenon de inaj profesiuloj, eksteraj kontribuantoj, ekspoziciaj kuratoroj, prelegantoj kaj aŭtoroj de katalogoj.

Sed malgraŭ la deziro dediĉi pli da spaco al inaj artistoj, la egaleco estas longe for de la normo. Laŭ studo publikigita en la scienca revuo *Plos One* en 2019, 87% de la artistoj ekspoziciataj en la 18 plej vizitataj muzeoj en Usono estis viroj. En Hispanio, raporto de 2024 de la Asocio de Virinoj en la Vidaj Artoj diskonigas, ke 57% de la hispanaj muzeoj ankoraŭ ne atingis la "egalecon", kiu estas konsiderata atingita kiam almenaŭ 35% de solistaj ekspozicioj estas dediĉitaj al inaj artistoj.

Intertempe, la verkaro de kelkaj artistoj estas daŭre elmontrata, kelkfoje jarcentojn post ilia forpaso. Tio estas vera, ekzemple, por la pentristino Artemisia Gentileschi (1593-1656), remalkovrita en la jaroj 2000 kaj nun elstara kiel emblema figuro inter la pentristinoj de la 17-a jarcento. En 2020, la Nacia Galerio en Londono dediĉis ĉefan ekspozicion al ŝi titolitan "Mi montros al viaj Estimataj Lordaj Moŝtoj kion virino kapablas fari". Rimarkinda entrepreno. ■

***-Esperantigis Carlo Minnaja (Italio)***

Guo Yi

*Doktoro pri Literaturo, Direktoro de la Centro de Protektado de Nemateria Kultura Heredaĵo de Zhejiang-Provinco kaj kuratoro de la Muzeo de Nemateria Kultura Heredaĵo de Zhejiang*

# Ekspozicio de vivanta heredaĵo en Ĉinio

Kiel vidigi tion, kio estas nevidebla: nemateria kultura heredaĵo? Inaŭgurita en 2023, muzeo en Zhejiang montras la vojon. Per alpreno de merga kaj interaga metodo, ĝi prezentas al vizitantoj lud-artojn, ritojn kaj tradiciajn kapablojn.

Ĉu mergi sin en la magion de legenda rakonto aŭ rigardi operon prezentatan sur tradicia scenejo? Tiaj spertoj nun estas alireblaj de la ĝenerala publiko. Situanta en la provinco Zhejiang, ĉe la sudorienta marbordo de Ĉinio, kaj ampleksanta 35000 kvadratajn metrojn, la Muzeo de Nemateria Kultura Heredaĵo de Zhejiang proponas al vizitantoj unikan ŝancon aktive partopreni en kulturaj tradicioj.

Nemateria heredaĵo estas laŭdifine dinamika – ĝi inkludas tradiciojn aŭ vivantajn esprimojn hereditajn de niaj prapatroj, kiel ekzemple buŝajn tradiciojn, prezentartojn, ritojn, festajn okazaĵojn aŭ kapablojn por produkti tradiciajn metiaĵojn.

Ekde 2004, la muzekomunumo esploras manierojn efike montri nematerian kulturan heredaĵon, ĉar ĝi komprenas, ke vivanta heredaĵo estas aktiva kaj ne povas esti plene reprezentita nur pere de artaĵoj. Ĉi tie, vizitantoj okupiĝas pri viglaj ekspoziciaĵoj, kiuj vivigas antikvajn tradiciojn per mergaj plurmediaj spertoj kaj vivaj prezentoj de metimajstroj. Dum la malferma ceremonio de la muzeo, en marto 2023, Emma Nardi, Prezidanto de la Internacia Konsilio de Muzeoj, bonvenigis ĉi tiun iniciaton, kiu antaŭenigas vivantan heredaĵon.

## La tradicia opera scenejo

En moderna Ĉinio, tradiciaj operscenejoj estas tre maloftaj. La malmultaj, kiuj restas, estas zorge konservataj kiel historiaj monumentoj kaj ne plu funkcias kiel lokoj de prezentado. Hodiaŭ, la plej multaj operoj okazas en modernaj teatroj.

Tradicia opera scenejo estas la ĉefornamaĵo de la Tradicia Teatro-Halo ĉe la Muzeo de Nemateria Kultura Heredaĵo de Zhejiang. Ĉi tiu delikata spektaklejo, larĝa je 11.8 metroj, pezas mirigajn 60 tunojn. Ĝi estis konstruita de 20 metiistoj tre lertaj pri tradiciaj ĉinaj konstruteknikoj. Kiam la projekto estis finita kaj la metiistoj spektis tradician operon prezentatan sur la scenejo de ili mem konstruita, ili estis kortuŝitaj ĝis larmoj.

Vizitantoj de ĉi tiu operejo estas transportataj reen en la tempon, mergitaj en la belecon kaj arton de la opero. Ili rigardas senĝene, starante aŭ sidante, laŭ la tradicia maniero ĉeesti prezentaĵojn de antikva opero.

Kantistoj rekreas tradician prezentadon, permesante al la spektantaro aŭdi la melodiojn de antikvaj instrumentoj, vidi la malsimplajn kostumojn kaj mimikojn de la geaktoroj kaj senti la potencajn emociojn transdonatajn tra la rakontoj prezentataj en la opero.

La scenejo inkludas du pordojn, certigante ke la geaktoroj sekvas tradiciajn protokolojn kiel ekzemple "出将入相 (chujiang ruxiang)" aŭ la ordon aperi sur

### Altnivela Forumo pri Muzeoj de UNESKO

**La Altnivela Forumo pri Muzeoj de UNESKO, organizita en septembro 2021 kun la subteno de la Arta Muzeo Zhizheng en Shenzhen (Ĉinio), traktis la defiojn alfrontatajn de muzeoj en la post-pandemia kunteksto.**

**La unua sesio de la Forumo okazis en 2016, en Shenzhen, Kreiva Urbo de Dezajno de UNESKO. La iniciato reflektas la daŭrajn klopodojn de UNESKO por subteni muzeojn kaj diskuti la estontecon de la sektoro.**

**La Forumo kontribuas ankaŭ por la efektivigo de la Rekomendo de UNESKO de 2015 pri la protekto kaj antaŭenigo de muzeoj kaj kolektoj, ilia diverseco kaj ilia rolo en la socio, kies celo estas doni gvidliniojn por plifortigi la rolon de muzeoj en nova epoko de socia, ekonomia kaj teknologia ŝanĝiĝo.**




*Merga spektaklo inspirita de la legendo de* La Amantoj de la Papilio *ĉe la Muzeo de Nemateria Kultura Heredaĵo de Zhejiang, en Ĉinio.*

> **"Ĉe la koro de la misio de muzeo estas la deziro engaĝi spektantarojn per partoprenaj spertoj**

scenejo: ili faras tion sinsekve, laŭ establitaj reguloj. Tio estas parto de la rigoraj normoj kaj proceduroj de tradicia opero. La scenejo mem fariĝas vivanta atesto de la riĉa heredaĵo de ĉinaj prezentartoj.

## Revivigo de scipovo

Ĉe la koro de la misio de muzeo estas la deziro engaĝi spektantarojn per partoprenaj spertoj, kiuj transformas la "unudirektan" edukan sperton en interagan aliĝon, kiam oni vidas la metiistojn, kiuj vivigas nematerian kulturan heredaĵon.

La teamo de la muzeo pasigis du jarojn skrupule spurante kaj dokumentante pli ol 500 homojn, kiuj partoprenas en nemateriaj tradicioj. Iliaj manoj, vunditaj kaj malglataj pro jaroj da dediĉo, rakontas historion pri pasio kaj metio.

La muzeo uzas avangardan ciferecan bildigon por prezenti ĉi tiun "netuŝeblecon" en perceptebla formo, kreante muron de bildoj prezentantaj centojn da lertaj manoj moviĝantaj – peklantaj ŝinkon, teksantaj bambuon, ĉizantaj lignon, prilaborantaj tefoliojn, ktp.

Dum vizitantoj trairas la ekspozicion, ili povas observi la skrupulan kreadprocezon realtempe kaj elektante ajnan bildon de speciala "manfaritaĵo", kiu interesas ilin. Cifereca teknologio transformas ĉi tiujn komplikajn procezojn en videblajn bildojn, permesante al la spektantaro senti kvazaŭ ili mem estus parto de la krea procezo.

## La *Legendo de la Blanka Serpento*

Legendaj rakontoj estas valora buŝheredita tradicio de nemateria kultura heredaĵo, transdonita tra generacioj. Ĉi tie en la muzeo ili estas kreive cifereciĝitaj por distri la spektantaron kaj profundigi ĝian komprenon pri ĉi tiu heredaĵo. La muzeo vigle prezentas du famajn legendojn, *La Legendo de la Blanka Serpento* kaj *La Amantoj de la Papilio* (Liang Shanbo kaj Zhu Yingtai), danke al eltiro de simbolaj kulturaj elementoj. Oni desegnas ilin en merga animacia spaco (kun efikoj kiel eksplodoj kaj ekbriloj).

Dum vizitantoj paŝas en ĉi tiuj virtualaj mondoj, ili envolviĝas en kirlantaj koloroj kaj sonpejzaĝoj. En "La Legendo de la Blanka Serpento", vizitantoj estas ĉirkaŭataj de eteraj akvaj animacioj, kie la boato de la amantoj aperas en kaskado de brilantaj partikloj. Dume, "La Amantoj de la Papilio" disvolviĝas inter vigla cifereca montrado de papilioj kaj muziko, mergante la spektantaron en rakonton de romantika amo kaj transformo.

Per la arta uzo de cifereca teknologio, la muzeo celas allogi pli da vizitantoj, precipe junulojn. Male al ekspozicoj de artaĵoj, kiuj temigas historian scion kaj objektojn, vivantaj ekspozicioj de heredaĵoj emfazas kulturan enhavon, elstarigante homojn kaj procezojn. Ili postulas reinterpretadon kaj kreivan prezentadon.

Ĝi estas la unua regiona ampleksa muzeo de Ĉinio de ĉi tiu speco, kaj oni atendas ke similaj ejoj estos baldaŭ malfermataj. En la jaro kaj duono post la malfermo, la Muzeo jam akceptis 760 000 vizitantojn.

La estonteco de muzeoj en Ĉinio estas formita laŭ la modelo "Museum+", kiu kunlaboras kun sektoroj kiel tiuj de cifereca komunikado, edukado kaj turismo por proponi pli allogajn kulturajn spertojn.

Ligante nematerian kulturan heredaĵon kun ĉinaj tradiciaj festivaloj, la muzeo ne nur protektas tiujn tradiciojn, sed ankaŭ integriĝas kun la urbo, la komunumo kaj nuntempa vivo. Ĝi kontribuas al la vigleco de la tempoj kaj la konservado de nemateria kultura heredaĵo. ■

***-Esperantigis***
***Luigia Oberrauch Madella (Italio)***


# Bonvenon al la mondo de la morgaŭo

Caroline Wilson-Barnao

*Direktoro de la Muzeaj Studoj, Universitato de Kvinslando, Aŭstralio*

La Aŭstralia Muzeo de Malkovroj, en Adelajdo, Aŭstralio, pretigas la venontan generacion por la defioj de la morgaŭo. Junuloj estas ne nur vizitantoj de la muzeo, sed ankaŭ kernaj roluloj en ĝia programado.

Allogi junulojn: ĉiu muzeo de la mondo alfrontas tiun defion. Sed des pli tiuj kiel la Aŭstralia Muzeo de Malkovroj (MOD), kies misio estas esplori la estontecon. La uzo de ciferecaj kaj mergaj teknologioj povas helpi allogi junajn vizitantojn, sed ĝi devas unue veki ilian intereson. Por engaĝi homojn kiuj alfrontas klimatan, demografian kaj naturmedian krizojn ekde infaneco, muzeoj devas ankaŭ provizi ilin per respondoj al la demandoj de ili starigitaj.



© Sam Roberts / kun la permeso de MOD

*La ekspozicio* ROMPITA *ĉe la Aŭstralia Muzeo de Malkovroj (MOD) de Adelajdo, Aŭstralio.*

> **MOD subtenas junulojn en ilia donado de signifo al priskriboj pri estonteco**

Ekde sia inaŭguro en 2018, MOD sukcese uzas mergajn ekspoziciojn por engaĝi adoleskantojn kaj junulojn en kritikaj konversacioj pri tutmondaj tendencoj. Laŭ la direktoro de MOD doktoro Kristin Alford, esploroj pri vizitantoj pruvas ke ĉirkaŭ 30 elcentoj de ĝia publiko konsistas el homoj kiuj aĝas inter 15 kaj 25 jarojn, grupo kiun multaj muzeoj taksas malfacile allogebla. “Ni havas normalan distribuon ĉirkaŭ tiu aĝo de 20 jaroj, kio laŭ mi estas agrabla afero. Tio grandaparte okazas pro la engaĝiĝo de niaj ekspozicioj pri temoj priatentataj de junuloj.”

Aldone al analizado de sciencaj esploroj kaj gazetaro por kompreni iliajn zorgojn, MOD uzas specifajn strategiojn por certigi ke ĝi engaĝiĝas pri temoj gravaj por la junularo. La sukceso de MOD povas esti taksata ankaŭ laŭ la nombro de vizitantoj kaj la multnombraj naciaj kaj internaciaj premioj kiujn ĝi gajnis pro novigo kaj kreivo en la kampoj de dezajno, gazetaro kaj turismo.

## Partoprenantoj kaj ankaŭ vizitantoj

Baziĝante sur progreso en esplorado kaj gazetara analizado, MOD efektivigis la celitajn strategiojn por solvi la zorgojn de junuloj kaj inkluzivigi ilin kiel partoprenantojn en la muzeo, pli ol nur vizitantojn.

MOD gastigas “forumon pri temoj de la estonteco” por muldi la kernojn kaj temojn de la muzeaj ekspozicioj. Tiuj estas organizataj per alpreno de metodologioj

de malferma spaco por ke la publiko mem kreu kaj administru la tagordon.

"Ĉiun duan aŭ trian jaron ni organizas forumon de ĉirkaŭ 100 homoj, en kiu la plej juna partoprenanto havas proksimume 15 jarojn. Ni invitas lernantojn, instruistojn, sciencistojn, universitatajn studentojn kaj reprezentantojn de la industriaj sektoroj kaj ni petas ilin imagi kio sekvos", diras Kristin Alford.

> **La sukceso de MOD povas esti mezurata laŭ la nombro de vizitantoj kaj la multnombraj naciaj kaj internaciaj premioj kiujn ĝi gajnis**

Aldone, MOD laboras kune kun Junulara Konsilio kiu renkontiĝas dekfoje tra la jaro. Kontraŭ honorario, trejnado pri dezajno kaj pensado pri la estonteco, la membroj de la Junulara Konsilio prezentas sian opinion pri prototipoj kaj konceptoj kiuj estas prezentataj al ili.

La nuna ekspozicio "ROMPITA", okazanta ĝis novembro 2024, estas bona ekzemplo de tiu ĉi deziro konsideri la zorgojn de la junuloj. Baziĝante sur la sento esprimita de multaj, laŭ kiu la socio situas ĉe haltejo en kelkaj areoj (misinformado, klimata justeco, rubaĵa mastrumado, hiperkapitalismo, ktp), ĝi kuraĝigas konsideron de alternativaj mondoj kiuj havigas kreemajn manierojn "muldi pli bonan estontecon". Por fari tion, MOD enplektas ideojn de specialistoj, inkluzive de tiuj kun fakaj konoj pri ekonomiaj politikoj, homoj kiuj laboras pri estonteco, esploristoj pri loĝado, socio kaj klimato, kaj ankaŭ verkistoj, artistoj kaj kolektivoj de aborigenoj.

Aliaj venontaj agadoj ĉe MOD inkluzivas sesion kun fakuloj pri la lingvo de arboj (kun kvizo kaj elmontrado), kaj la Printan Feston de la Batalanto Zina, kiu estas renkontiĝo en kiu lokaj kreantoj povas aĉeti, interŝanĝi kaj vendi siajn *zinojn* (malgrandajn mempublikigitajn magazinojn).

## Pozitivaj sentoj

La esplorado de temoj kiel la klimatŝanĝiĝo povas esti ankaŭ fonto de anksio kiam oni alfrontas la vastegecon de la defioj. Pro tio la muzeo subtenas junulojn en ilia donado de signifo al serio de priskriboj pri estonteco, kio implicas helpi ilin gajni pli da komforto rilate al necerteco.

"Homoj povas sin senti anksiaj kiam ili diskutas pri temoj kiel klimatŝanĝiĝo, AI, mensa sano kaj loĝeja pagebleco", diras Kristin Alford, "do ni provas konstrui medion kiu subtenas kreemon kaj novigon por certiĝi, ke la vizitantoj je la fino sentos sin esperplenaj kaj preparitaj imagi sian kapablon alfronti kompleksecon kaj plani por tio, kio estas nekonata".

La ekspozicioj de MOD estas enkadrigataj surbaze de la teorio de espero. La ekspozicio "ROMPITA", ekzemple, estas dezajnita ĉirkaŭ tri leviloj de espero. La publiko estas invitata imagi pozitivan bildon de la estonteco en maniero kiu estas orientata laŭ la celoj, esplori la potencialon de ĉi tiu pensmaniero uzante diversajn vojojn, kaj pensi pri la homa kapablo esti kreema kaj inventema.

## Alia estonteco eblas

Dum multaj muzeoj tuŝas temojn pri la estonteco, kiel robotiko kaj Artefarita Intelekto, tio, kio distingas la estontec-orientitajn muzeojn, estas la profunda dediĉo stimuli la pripensadon pri estontecoj en siaj ekspozicioj.

"Estontec-orientitaj muzeoj estas ligitaj al loko kaj kulturo kaj ili samtempe reprezentas estontecon deirantan de tiu loko. Ili ne timas fari demandojn kiuj defias povon kaj atingas plurajn perspektivojn. Ni taksas, ke la estonteco havas la kapablon esti malsama ol la nuno", klarigas Kristin Alford.

La Muzeo de la Estonteco de ajo, ekzemple, prezentas imageblajn situaciojn de 2071 por helpi vizitantojn imagi eblajn estontecojn por spaco, naturo kaj persona bonfarto. Alia ekzemplo povas esti trovita ĉe la Nacia Centro por Scienco kaj Teknologio de Kanbero, Aŭstralio, kiu freŝdate esploris nociojn kiel kopirajto, posedo, kreivo kaj biaso en ekspozicio titolita *Amiko aŭ malamiko – la Kresko de Artefarita Intelekto*.

Muzeoj kiel MOD estas modelo por aliaj institucioj. Nun pli ol iam ajn antaŭe, estas esence, ke muzeaj ekspozicioj kaj politikoj ne evitu malfacilajn temojn kaj strebu trankviligi debatojn foje tiklajn, tiel ke civitanoj povu starigi informitajn opiniojn. ■

***-Esperantigis Manuela Burghelea (Belgio)***

## Muzeoj, lokoj de kolektiva memoro

**La 24-an de majo 2024, la evento "Kontaktigi kulturojn: survoje al novaj muzeaj perspektivoj" kreis konversacion inter muzeaj fakuloj, komunumoj kaj politikistoj, pri la aliformiĝo de muzeoj kaj ties ŝlosila rolo en la protektado de kultura heredaĵo kaj kolektiva memoro.**

**Renkontiĝante en la sidejo de UNESKO en Parizo kaj interrete, la diskutantoj priparolis la rolon de muzeoj en la etika revenigo kaj redono de kulturaj objektoj kaj la bezonon de pli granda enplektado de indiĝenaj kaj diasporaj komunumoj en muzeaj praktikoj kaj ekspozicioj.**

**UNESKO subtenas muzeojn en ilia kreskanta serĉado de graveco kaj efikeco. La *Deklaracio Mondiacult*, akceptita je la konkluda fazo de monda konferenco dediĉita al kulturo, organizita de UNESKO en Meksikurbo, en septembro 2022, alvokas la landojn investi en edukocelaj muzeoj.**

ZOMO

# Ombroteatro de Jean-François Spricigo



Fotoj:
**Jean-François Spricigo,**
kun afabla permeso de
Galerio Camera Obscura,
Parizo

Teksto:
Agnès Bardon,
*UNESKO*



"Ne lasu ion ajn veni inter la lumo kaj vi. " Nenio povus pli bone priskribi la verkojn de la belga fotisto Jean-François Spricigo ol tiu ĉi admono de la usona poeto Henry David Thoreau, kiu aperas ĉe la komenco de lia libro *Ni la horizonto restos solaj*. La serio, kiun li prenis de siaj vojaĝoj al Reunio, Majoto kaj Gujano, strikte sekvas ĉi tiun instrukcion.

Suverena, la lumo igas vizaĝojn eliri el la naturo, skulptas ombrojn, traboras la tropikan nokton. Kaptitaj en konturo nigra kaj blanka, for de la kutima bunto, liaj pejzaĝoj fariĝas vivo, movo, spiro. Lia silenta poezio rakontas pli bone ol iu alia la eksciton de krepusko, la humidecon de posttagmezo, la profundon de silento. Ĝi havas la potencon kaj malfortikecon de sonĝo.

Homo, besto aŭ arbo estas traktataj egale, sen juĝo aŭ hierarkio. Kun la sama respekto. La buŝo de la kajmano eliranta el la rivero, homa silueto aŭ foliaro estas ĉiuj aperoj de ĉi tiu ombroteatro kie ĉio estas en sia loko kaj kie la limoj estas malklaraj. Inter la tago kaj nokto. Inter la sovaĝa mondo kaj tiu de la homoj. Inter sonĝo kaj realo. Ĉi tiuj bildoj ne ekzistas por esti rigardataj, sed por esti vivantaj.

Jean-François Spricigo estas plurfaka artisto kiu ankaŭ verkas, kreas muzikaĵojn kaj prezentas sin en teatro. En 2023, li gajnis la Premion Nadar Gens d'images, aljuĝatan ĉiujare al iu libro de fotado. ■

***-Esperantigis Kim Ribeiro (Brazilo)***





























# Ekologiaj koridoroj: ĉu entute



La ekovojo De Borkeld en Nederlando.

Menno
Schilthuizen

*Evoluada biologo kaj ekologiisto ĉe la Centro por Natura Biodiverseco en Leiden (Nederlando). Li ankaŭ instruas evoluismon ĉe Universitato de Leiden.*

# bona ideo?



© Maarten Zeehandelaar / Shutterstock

Kunligi naturajn spacojn estas esence por malakceli perdon de biodiverseco. Tiu konsidero, preskribata de sciencaj ekologiistoj, estis dum longa tempo la absoluta normo en natura konservado. Tamen kreskanta nombro da sciencistoj nun esploras la pozitivajn punktojn de la naturmedia fragmentiĝo.

Veturantoj sur la ŝoseo A4 inter Hago kaj Roterdamo eble rimarkos, ke la superpasejo, kiun ili rapide preterpasas iom sude de Delft, estas nekutime larĝa, sed ili ne atentos ĝin plu. Tamen la 100 metrojn larĝa strukturo estas la plej larĝa "ekovojo" de Nederlando. Marĉo, kanaj heĝoj, torfa fosaĵo, paŝtejo, kaj tuta rivereto estas kunpremitaj en ĉi tiun atingon de civila inĝenierado. Ĝi estas klasika ekzemplo de natur-koridoro.

Tiuj koridoroj ne estas ekskluzivaj al Nederlando; tiuj, kiuj konektas izolitajn natur-rezervejojn ambaŭflanke de la landlimo inter Nepalo kaj Barato estas multe pli grandaj. Kune, ili nun konsistigas la 300 kilometrojn longan pejzaĝon de la Terai-Arko. Kaj Pekino fieras pri reto de verdaj koridoroj por "liberigi" la multajn izolitajn urbajn verdajn spacojn de la vasta urbo. Jen kelkaj ekzemploj de multaj provoj inversigi la fragmentiĝon de naturaj habitatoj.

Ĉar fragmentiĝo estas malbona: ĝi kaŭzas genetikan kaj ekologian malriĉiĝon. Imagu naturan habitaton, kiu estas dispecigita en apartajn partojn, kiuj kuŝas je konsiderindaj distancoj unuj de la aliaj. Enfermitaj en ili estas unikaj specioj, kiuj dependas de tiuj restantaj fragmentoj de sia plej ŝatata habitato. Kvankam tiuj fragmentoj povas esti multaj, la vivoj de tiuj unikaj specioj pendas sur fadeno pro io nomata la malaper-vortico. Tia vortico de pereo povas okazi laŭ la prezentota maniero.

## La estingiĝo-vortico

Imagu papilion, kiel ekzemple la "trivitan hesperion" (*Erynnis tages* en la latina, speco de papilio), en malgranda, izolita herbejo sur kalka grundo ie en nordokcidenta Eŭropo. Tie ĝi vivas en miloj, sed ĝi ne povas pluvivi en la ĉirkaŭaj agrikulturaj kampoj. Nun supozu, ke venas malseka vintro kaj multaj raŭpoj mortas pro ŝimo; imagu, ke en tiu sama jaro okazas varma printempo, kiu vekas la postvivantajn raŭpojn el vintrodormado antaŭ ol ilia nutra planto kreskigis sufiĉe

→




© Jessica Kirsh / Shutterstock

*Birdrigardo de la Centra Parko de Novjorko.*

da junaj folioj, kaj multaj raŭpoj mortas pro malsato.

Kaj nun imagu, ke tiu populacio estas plu reduktita de somera arbarofajro. La malmultaj postvivantoj reproduktiĝas, sed iliaj idoj estas tiom malmultaj, ke ili estas devigitaj pariĝi kun gefratoj. Endogamio kaŭzas epidemion de genetika malsano, kiu povas dronigi tiun populacion de la ”trivita hesperio” en la estingiĝo-vorticon. La ŝancoj, ke specio spertas tiom da fatalaĵoj, estas malaltaj, sed tio okazas. Tia estis la kompreno de Ilkka Hanski, finna ekologiisto, kiu disvolvis la ”metapopulacian ekologion” en la 1980-aj jaroj. Loka formorto estas neevitebla, rimarkis Hanski. Ĉiujare, kelkaj specioj malaperas el fragmento de natura habitato. Sed samtempe, la samaj aŭ malsamaj specioj ekloĝas en aliaj lokoj. Do, ĉiu specio ekzistas en la pejzaĝo kiel metapopulacio: reto de populacioj, kiuj estas konstante formortantaj kaj reloĝataj sen la plena malapero de la tuta reto. Tio estas, kondiĉe ke ekzistas sufiĉe da ĉirkaŭaj populacioj por reloĝigi populacion kiam ĝi formortas. Hodiaŭ, multaj habitat-fragmentoj estas tiel malgrandaj kaj troviĝas tiel malproksime unuj de la aliaj, ke tiu reloĝigo jam ne estas ebla. La ”trivita hesperio” estas forta fluganto, sed ĝi ne facile transiros malamikan terenon ĝis alia herbejo.

Tial multaj specioj formortas ĉar ili estas ”dispecigitaj”, kaj la pecoj ne povas esti

> **“Naturo kaj konservadaj politikoj ne profitas el longdaŭra akademia tranĉea milito**

replenigitaj ĝustatempe. Kiam estingiĝo kaj koloniigo ne plu povas ekvilibrigi unu la alian, biodiverseco malaperas. Jen la ideo malantaŭ ĉiuj tiuj koridoroj: redukti la ŝancojn de loka formorto kaj plifortigi tiujn de reloĝigo.

## La blankpiedaj musoj

Malfragmentiĝo fariĝis tiel enradikiĝinta en la praktiko de naturkonservado, ke oni povus atendi, ke ĉiuj subtenas ĝin. Tamen, en la lastaj jaroj, kontraŭmovado ekestis inter sciencistoj, kiuj sentas, ke fragmentiĝo kelkfoje ankaŭ povas esti bona afero.

> “ **Multaj specioj estas ”dispecigitaj”, kaj la pecoj ne povas esti replenigitaj ĝustatempe**

Multaj fragmentigitaj populacioj estas genetike adaptitaj al lokaj kondiĉoj. Jason Munshi-South, de Universitato Fordham (Usono), malkovris tion ĉe la blankpiedaj musoj, kiuj vivas en izolitaj parkoj en kaj ĉirkaŭ Novjorko. Karakterizaĵoj, kiuj ebligas al la bestoj pli bone rilati kun loka nutraĵo aŭ lokaj malsanoj, evoluis ene de ĉiu parko en nur kelkaj jarcentoj. Se oni kunligus tiujn fragmentojn kaj igus genojn cirkuli inter ili, genetika ”poluado” povus malfari la laboron de loka evoluo. Alia zorgo estas tio, ke koridoroj povus ankaŭ helpi invadajn aŭ super-konkurencajn speciojn disvastiĝi kaj puŝi rarajn relikvajn speciojn al formorto.

Estas malfacile eksperimente studi tiajn situaciojn je pejzaĝa skalo, sed en la miniatura mondo de testo-tuboj kaj petri-pladoj, tio eblas. Teamo de esploristoj bazitaj en Britio konstruis sistemon de mikro-ekosistemoj, en kiuj ili povis manipuli la gradon de fragmentiĝo kaj konektebleco sen ŝanĝi la grandecon de la tuta ekosistemo mem. La sistemo estis loĝata de ok specioj de unuĉelaj protozooj: tri predantoj kaj kvin predatoj. La esploristoj malkovris, ke ju pli fragmentigita estis la sistemo, des malpli da specioj formortis. Ĉefe ĉar fragmentiĝo malhelpis la disvastiĝon de unu el la plej konkurencivaj predantoj.

## Dogmo pridisputata

Alia risko fari el malfragmentiĝo dogmon, diras Lenore Fahrig ĉe Universitato Carleton en Otavo, estas tio, ke ĝi nutras la malĝustan ideon, ke malgrandaj izolitaj fragmentoj ne indas esti konservataj krom se ili estas konektitaj al pli grandaj. ”Tio okazas ĉiam,” ŝi diras. ”En Ontario, marĉoj vastaj je malpli ol du hektaroj ne rajtas ricevi protektan statuson. La konsekvenco estas, ke konstante malgrandaj marĉoj estas perditaj.” Por batali kontraŭ tiu miskompreno kaj ekscii, ĉu la pozitivaj efikoj de fragmentiĝo kelkfoje povas superi la negativajn, Fahrig faris metaanalizon de studoj. Ŝiaj rezultoj estas surprizaj. En pli ol tri kvaronoj de preskaŭ 400 kazoj, kiujn ŝi studis, la efikoj de fragmentiĝo estis pozitivaj anstataŭ negativaj. Fragmentigitaj habitatoj subtenis pli grandan biodiversecon, ankaŭ ĉe protektitaj kaj minacataj specioj, en tropikaj kaj mezvarmaj klimatoj, en ĉiuj grupoj de organismoj kaj ĉiuj spacoskaloj.

## Tempo por mallevi armilojn

Ĉi tiu analizo ekigis ondon da protestoj de multaj esploristoj. Sed en pasia respondo, Lenore Fahrig kaj 21 kunaŭtoroj rebatis la kritikojn. Naturo kaj konservaj politikoj ne profitas el longdaŭra akademia tranĉea milito, diras Lenard Fahrig. Tial ŝi kaj ŝiaj kolegoj publikigis en 2023 repacigan artikolon, en kiu ili klarigas, kio kaŭzas la konflikton kaj kie troviĝas ĝiaj solvoj.

Fakte, ili diras, fragmentiĝo kaŭzas lokan formorton kaj endogamion, kaj tial redukton de biodiverseco. Sed dum fragmentiĝo eble estas malbona por biodiverseco en ĉiu individua fragmento, ĝi povas esti profita por la biodiverseco en la regiono ĝenerale. Ĉio dependas de la pejzaĝo, la grandeco de la fragmentoj kaj la tipoj de organismoj implikitaj.

Tial la aŭtoroj petas la ekologian mondon mallevi la armilojn kaj ekiri en malferman dialogon por labori cele al aro da rekomendoj, kiujn la politikistoj pri naturo povas uzi. Fakuloj pri konservado, kiuj devas fari rapidajn decidojn por aŭ kontraŭ fragmentiĝo, daŭre alfrontas frustrajn dilemojn, sed almenaŭ senkritika malfragmentado ne plu estas rigardata kiel la universala savtabulo de konservado, kia ĝi estis dum longa tempo. ■

***-Esperantigis James Rezende Piton (Brazilo)***

© alvarobueno / Shutterstock



◥ *Centoj da ruĝaj mangrovaj kraboj transiras vojojn serĉante la oceanon, sur la duoninsulo Guanahacabibes en Kubo.*

Intervjuo de
Anuliina Savolainen
UNESKO

# Rumman Chowdhury: "Ni povus esti enirantaj post-veran mondon"



© Anastasia Pek

Rumman Chowdhury

*Iama direktoro pri maŝinlernado-etiko ĉe Twitter, ŝi estas influa bangladeŝ-usona datumsciencisto kaj fondinto de la teknologia neprofitcela organizo Humane Intelligence.*

La datuma sciencistino Rumman Chowdhury sonigas alarmon pri reta ĉikanado kaj perforto bazita sur sekso en la epoko de genera artefarita intelekto (AI). Krome, ŝi avertas kontraŭ la danĝeroj de malica uzo de novaj teknologioj, kiuj trafas la plej vundeblajn homojn, kaj postulas plian atenton pri la diverseco de uzantoj.

***Vi estas la aŭtoro de la esploro de UNESKO pri teknologi-faciligita perforto bazita sur sekso en la erao de genera artefarita intelekto (AI), publikigita en novembro 2023. Kiel tiuj teknologioj pligrandigis la eblajn vojojn por tia perforto kontraŭ virinoj kaj knabinoj?***

Kun genera AI ni havos pli konvinkajn falsajn amaskomunikilojn, kaj virinoj estos speciale submeteblaj al ĉi tiu minaco. Perfortaj minacoj kontraŭ elstaraj virinoj estas oftaj. Nun imagu, ke tio estas akompanata de tre realismaj fotoj de vi, viaj infanoj, viaj amatoj, produktitaj per genera AI. Per la nuntempa teknologio, tio povas esti farita tre facile eĉ de tiuj mallertaj pri programado. Reta perforto bazita sur sekso kutime komenciĝas per reta ĉikanado. 26 procentoj de junaj virinoj spertis retpersekutadon kompare kun 7 procentoj de viroj en la sama aĝogrupo, laŭ lastatempa studo. Ĝenerale, per genera AI estos pli da generita enhavo – perforta enhavo, misgvida enhavo kaj simple "ruba" enhavo. La granda inundo de tiaj informoj, celante troigi kaj distri, pligrandigos la perforton kontraŭ virinoj. Perforto bazita sur sekso estas plue pligravigita de neintencaj damaĝoj, kie implicitaj diskriminaj praktikoj kaj seksismo en la socio estas enmetitaj en la AI-modelojn. Iuj el la pli konataj ekzemploj estas AI-modeloj supozantaj ke virinoj estas flegistinoj aŭ instruistinoj, anstataŭ kuracistoj aŭ sciencistoj, aŭ bildoj de virinoj aŭtomate seksoferante sen konsento aŭ intenco.

> **Eblas krei tre fidindan falsan rakonton per malveraj fotoj aŭ video**

***Kiuj specoj de ŝablonoj estas malantaŭ falsaj informoj kreitaj de AI?***

Kunmetitaj profundaj falsoj estas maltrankviliga manifestiĝo: eblas krei tute falsan rakonton pri iu ajn, kombinante multoblajn fabrikitajn fontojn de amaskomunikiloj, kio kondukas al tre kredindaj sintezaj historioj kun falsaj fotoj, artikoloj, aŭdvidaj enhavoj, disvastigitaj interrete. Homoj familiaraj al kampanjoj pri mis- kaj malinformado scias, ke iuj agantoj pasigas jarojn kreante falsajn kontojn kaj fikciajn rakontojn; genera AI faciligas, ke ĉi tiu malica ago estu plejparte aŭtomatigita. Simile maltrankviliga estas la kapablo krei interagajn profundajn falsojn. Estos eble trejni roboton por paroli kiel ajna homo kaj trompi homojn por pensi, ke iu diras ion, kion li aŭ si fakte ne diris. Ĉi tiu sama procezo povas esti aplikata por krei tute falsan konton en socia amaskomunikilaro kaj ŝajnigi esti elstara virino – aŭ ajna virino – interrete, dirante aferojn, afiŝante aferojn kaj farante aferojn, kiuj igas ŝin aspekti malbone. Krimuloj de teknologi-faciligita perforto bazita sur sekso povus uzi ĉi tiun specon de teknologio por imiti la identecojn de virinoj interrete kaj ruinigi iliajn profesiajn aŭ privatajn rilatojn, kaj eĉ sekvi viktimojn de tia perforto ŝajnigante esti iu, kiun ili konas. Kaj fine ekzistas la fiprogramoj. Malicaj agantoj povas krei fiprogramojn por ŝteli personajn informojn kaj sekve publikigi privatajn informojn pri siaj viktimoj. Pro la novaj iloj, la tempo por estigi aŭtomatigitajn ĉikanajn kampanjojn per kreado de malica kodo estas multe pli malgranda: kompleta reta ĉikana kampanjo povas esti kreita en 15-20 minutoj. Ĉio, kion vi devas fari, estas informi al la genera AI, kion vi volas skribi, kaj ĝi generos la kodon por vi. Poste vi povas peti ĝin helpi vin generi kodon por afiŝi la enhavon en ies socia amaskomunikila konto ĉiun dekon da minutoj.

***Kiun el tiuj evoluoj vi trovas la plej maltrankviliga?***

Mi zorgas pri ĉiuj el ili, kaj tio, kio aparte zorgigas min, estas la fina efiko, kiun ili havos. Mi timas, ke ni eniros mondon post-veran, kie nenio, kion ni vidas rete, estas kredinda aŭ fidinda. Tiamaniere la mondo regresos el tutmonda, komunikema, konversacia socio, kiu ekzistas en la Interreto, al tiu, kie ĉiuj estas tre suspektemaj. Ni perdus tiom da mirindaj progresoj en la socio, se ni enirus mondon, en kiu ni ne povas fidi tion, kio aperas interrete. Ni ankaŭ devus zorgi, ĉar plej multaj damaĝoj interrete komenciĝas kun la plej simplaj homoj. La plej vundeblaj komunumoj – kiel knabinoj kaj virinoj de minoritataj rasoj, etnoj, genroj, kastoj aŭ sociekonomia stato – estas tiuj, sur kiuj tiuj specoj de atako estas unue provitaj, kaj tio devus esti indikilo por la cetera mondo, ĉar tio venos sekve al ĉiuj aliaj.

→

***En la raporto vi konkludas, ke estas la viktimo, kiu devas protekti sin. Kiel povus reta protekto esti plifortigita?***

Plej multaj ekzistantaj iloj por reta protekto neintence kreas ″inhiban efikon″, alivorte, la celo de tiuj iloj estas forigi vin el la konversacio por protekti vin, kio estas maljusta, sed ankaŭ laŭvorte neebla por elstaraj virinoj kiel politikistoj aŭ ĵurnalistoj, kies laboro devas ekzisti en sociaj retejoj. Do, esence, vi diras al virinoj, ke por esti protektitaj en ĉi tiu medio ili devas eliĝi el ĝi. Plej multaj el tiuj aplikaĵoj ankaŭ metas la tutan respondecon sur la viktimon. Virinoj devas decidi kaj agi pri raportado. Anstataŭe, aplikaĵoj devus esti evoluigitaj por instigi la komunumon liveri subtenon, kun nula toleremo al homoj, kiuj aktivas pri ĉikanado de virinoj. Krome, iuj distribuistoj de enhavoj fakte fermis la kapablon krei sendependajn triapartajn ilojn, kiel komunumbazitaj iloj kreitaj de noventreprenoj, por ebligi al homoj protekti sin kontraŭ reta ĉikanado.

Mi estis bonŝanca partopreni en iuj el la plej gravaj decidocentraloj, kaj ĉiufoje mi diras la saman aferon: kiom da tiu mono vi asignas al retprotektiloj? Investu same multe sur reta protekto, kiom vi elspezas por AI-evoluigo. Tiuj teknologioj neniam faros la pozitivan influon en la mondo, kiun ni ĉiuj imagas, se ni ne faros ilin sekuraj por esti utiligataj.

## UNESKO avertas pri la riskoj, kiujn genera AI prezentas al virinoj kaj knabinoj

**Genera Artefarita Intelekto (AI) pligrandigis ekzistantajn metodojn de reta ĉikanado kaj pliigis la eblajn vojojn por genrobazita perforto interrete. Ĉi tio estas la ĉefa eltrovo de la UNESKO-raporto *″Ĉiukaze via opinio ne gravas″: eksponante teknologi-faciligitan genrobazitan perforton en la epoko de genera AI*, publikigita en novembro 2023.**

**La raporto, verkita de la specialistoj pri *Grandaj Datumaroj* Rumman Chowdhury kaj Dhanya Lakshmi, argumentas, ke kvankam profundlernaj modeloj revolucias la manieron, kiel homoj aliras informojn kaj interagas kun enhavoj, ili prezentas zorgojn pri la ĝenerala protekto kaj antaŭenigo de homaj rajtoj kaj pri la sekureco de virinoj kaj knabinoj. La damaĝoj povas inkludi pli realismajn falsajn amaskomunikilojn kaj falsajn rakontojn, kaj multe pli vastan atingon de malamo kaj misinformado. Reta ĉikanado en sociaj retejoj ankaŭ povas esti pligrandigita helpe de AI-generitaj ĉikanadŝablonoj – kreskanta zorgo en situacio, kie preskaŭ 60 procentoj de junaj virinoj tutmonde raportas, ke ili alfrontis retan ĉikanadon en socia retejaj platformoj.**

**Dua studo, titolita *Defii sistemajn antaŭjuĝojn: Esploro pri genra antaŭjuĝo en grandaj lingvomodeloj*, publikigita de UNESKO kaj IRCAI (Internacia Esplora Centro pri Artefarita Intelekto) en printempo 2024, prezentas same zorgigajn tendencojn pri grandaj lingvaj modeloj (natur-lingvaj prilaboraj iloj, kiuj subtenas popularajn generajn AI-platformojn) kiuj povas produkti genran antaŭjuĝon, same kiel homofobion kaj rasan stereotipadon. Ambaŭ publikaĵoj emfazas la neceson de agado fare de AI-evoluigistoj kaj publikaj respondeculoj por kontraŭbatali la novajn minacojn. Proponitaj solvoj inkludas la efektivigon de la *Rekomendo pri la etiko de Artefarita Intelekto*, akceptita de la Membro-Ŝtatoj de UNESKO en novembro 2021.**

> **“En preventado de ĉikanado, misinformado kaj malinformado devenantaj de genera AI, ĉiuj havas rolon por kunludi**

***Vi diris, ke ni bezonas pripensi la diversecon en la decidcentraloj kiam ni laboras pri algoritmoj. Kial tio gravas?***

Firmaoj provas fari produktojn por ĉiuj, sed se vi rigardas la demografion de kiu estas en la decidcentralo, ĝi estas tre malgranda parto de la mondo. Se ni havas nur unu tipon de persono, genro, geografia regiono aŭ eduka fono reprezentita, ni maltrafas diversajn sciojn kaj informojn. La skalo kaj amplekso de la problemoj estas tiel grandaj, ke ricevi kontribuon de la publiko estas la plej grava afero. Mia neprofitcela organizo, Humane Intelligence, estas konata pro sia laboro pri publikbiasaj premioj kaj simulado de atakoj. Ni malfermas AI-modelojn al la publiko kaj pristudas iliajn reagojn.

En iuj kazoj, ili parolas lingvon aŭ venas de fono, kiu ne estas bone reprezentita en AI-datumoj aŭ modeloj. En aliaj, ili estas profesiuloj, kiel arkitektoj aŭ sciencistoj, kiuj taksos la modelon el sia propra profesia perspektivo. Pasintjare, ni kunordigis la plej grandajn, iam ajn organizitajn, profundajn ekzercojn por genera AI, kiu gastigis pli ol 2 200 individuajn taksojn.

Por enigi pli da virinoj, anoj de malplimultoj kaj aliaj nebone reprezentitaj



© Boris Séméniako por *UNESKO-Kuriero*

grupoj en la AI-industrion, ni devas kompreni kiel forfalo okazas tra la tuta procezo. Instruistoj, kiuj diras al knabinoj, ke programado estas por knaboj; aŭ dungpraktikoj, kiuj favoras virojn super virinoj. Homoj ofte dungas siajn amikojn kiam ili fondas ekfirmaojn, do se ilia reto konsistas nur el viroj similaj al ili, tiam vi ne akiros diversecon. Krei programojn por instigi, ekzemple, pli da entreprenemaj virinoj fondi kompaniojn, aŭ programojn kiuj normaligas la fakton, ke knabinoj povas programi, helpas rompi iujn el la ekzistantaj stereotipoj.

> **“Per la novaj iloj, plena reta ĉikanadkampanjo povas esti kreita en 15-20 minutoj**

***Vi laboras kune kun gravaj teknologiaj kompanioj por ebligi la respondecan uzadon de novaj teknologioj kiel genera AI. Kial estas en la intereso de la industrio certigi, ke iliaj produktoj estas etikaj kaj inkluzivigaj?***

Kompanioj de genera AI volas konstrui produktojn, kiuj estas sekuraj kaj fidindaj, ĉar ili volas, ke aliaj kompanioj uzu ilin. Produktoj ne estos kreitaj se estas risko, ke AI diru ion rasisman aŭ seksisman, plifortigu damaĝojn, plifortigu perforton, do ekzistas instigo labori kune por solvi tiujn problemojn. Ĉi tiuj problemoj estas grandaj kaj tutmondaj laŭ skalo, do estas tre malfacile, se ne maleble, por unuopa kompanio solvi ilin. En malhelpado de ĉikanado, misinformado kaj malinformado devenantaj de genera AI, ĉiuj havas sian rolon por ludi – generantoj de enhavoj, platformaj kompanioj, kompanioj de sociaj amaskomunikiloj, politikofarantoj, registaroj, civila socio kaj neprofitcelaj organizaĵoj, kaj ordinaraj homoj, kiuj povas esti sur tiuj platformoj. Organizaĵoj kiel UNESKO havas gravan rolon por kunlabori en la difinado de normoj, kiuj helpos al kompanioj dezajni programojn pli respektemajn al diverseco. ■

***-Esperantigis Ursula Grattapaglia kaj Alejandro Cossavella (Brazilo)***

Gina Doubleday
UNESKO

# Edukado: la kosto de neagado



La financaj kaj sociaj kostoj de manko de edukado estas ruinigaj. Raporto de UNESKO, Organizo por Ekonomiaj Kunlaboro kaj Evoluigo (OEKE) kaj la Sekretariejo de la Komunumo de Nacioj (angle: Commonwealth) eldonita en junio 2024, titolita *La Kosto de Neagado: La Tutmondaj Privataj, Publikaj kaj Sociaj Kostoj de la Manko de Lernado de Infanoj kaj Gejunuloj* prezentas la koston por la tutmonda ekonomio pro infanoj malhavantaj bazajn lertojn je 10 bilionoj da usonaj dolaroj jare ĝis 2030. Alia malkovro de ĉi tiu studo estas tio, ke malgraŭ klopodoj faritaj de diversaj landoj, la nombro de eksterlernejaj infanoj restas alta, kun 128 milionoj da knaboj kaj 122 milionoj da knabinoj ekskluditaj de lernejoj.

*-Esperantigis Renato Corsetti (Italio)*



## EKSTER LERNEJO KAJ LERTO-MANKOJ

**250** milionoj da infanoj kaj gejunuloj tutmonde ankoraŭ estas ekster lernejo

**128** ♂ milionoj da knaboj

**122** ♀ milionoj da knabinoj



**57%** de la studentoj malhavas bazajn lertojn

## SOCIA DAMAĜO

**39%** pliiĝo en nombro **de ŝteloj**

**27%** pli alta eblo de **seksa perforto**

**37%** pli alta eblo de **fizikaj atakoj**

**57%** pliiĝo en nombro **de mortigoj**

**38%** Pliiĝo en la nombro de junuloj ne **lernantaj, laborantaj aŭ trejniĝantaj**



## EKONOMIAJ EFIKOJ

UNESKO metas la koston por la tutmonda ekonomio pro manko de lertoj ĉe infanoj je


**10 bilionoj da usonaj dolaroj jare ĝis 2030.**

**Samvalora je pli ol la jara Malneta Enlanda Produkto (MEP) de Francio kaj Japanio kombinitaj.**

Male, la raporto taksas, ke, se oni malpliigus la procentaĵon de lernej-frulasintoj aŭ de tiuj senbazaj lertoj je nur 10%, pliiĝus la jara MEP-kresko je 1 ĝis 2 elcentoj.

### Jara tutmonda kosto

(Bilionoj da usonaj dolaroj)






## KONSEKVENCOJ POR KNABINOJ

Mankoj en la akiro de bazaj lertoj estas kunligitaj, tutmonde, kun

**69-elcenta pliiĝo de fruaj gravedecoj inter junaj knabinoj.**

Ĉiu jaro de mezlermeja edukado kontribuas por malpliigi la riskon de knabinoj edziniĝantaj kaj havantaj infanon antaŭ 18-jariĝo.

### Efiko de manko de bazaj lertoj je posta laboro, edukado kaj trejniĝo:





**Manko de bazaj kapabloj igos knabinojn neaktivaj pli probable ol knabojn.**



unesco

# Muzeoj tra la mondo




Kiel spacoj por dialogo kaj centroj por esplorado kaj edukado, muzeoj ludas decidan rolon en niaj socioj, kontribuante al la konservado de kultura heredaĵo, disvolviĝo, integriĝo kaj socia unuiĝo.

Ĉi tiu raporto diskonigas pri signifaj paŝoj en vicigado de strategioj, plibonigo de konservaĵa administrado, plifortigo de juraj kaj etikaj kadroj, kaj alvoko por la revenigo kaj restituo de kultura posedaĵo, traktante la defiojn kaj ŝancojn de cifereca transformado. Malgraŭ tiuj defioj, ekzistas kreskanta engaĝiĝo al etikaj praktikoj, internacia kunlaboro kaj plifortigita alirebleco, kun la celo kreskigi estontecon kie la muzea sektoro decide antaŭenigas kulturan diversecon kaj inkluzivecan partoprenon.

UNESCO Publishing
978-92-3-100718-7
66 pp, 210 x 297 mm, paperback

Legu
la raporton

www.unesco.org/en/publications

# ĈINA ESPERANTO-MUZEO

Ĉina Esperanto-Muzeo en Zaozhuang, la plej granda Esperanto-muzeo en la mondo, estas kune konstruita de Ĉina Esperanto-Ligo kaj Zaozhuang-a Universitato. Ĝi ludas rolon konservi la Esperanto-kulturon kaj heredi Esperanto-civilizacion. Nun la muzeo havas konservaĵojn donacitajn el 26 landoj, inkluzive de 61784 konservaĵoj transdonitaj de Ĉina Esperanto-Ligo.



# Printempa Festo

Printempa Festo estas la tradicia ĉina festo kun la plej vasta influo. En miloj da jaroj la festo konservas la ligojn inter individuoj kaj familioj kaj ludas gravan rolon en la ĉina civilizacio. Printempa Festo, socia agado de la ĉina popolo celebre de la tradicia novjaro, jam eniĝis en la Reprezenta Listo de la Nemateria Kultura Heredaĵo de la Homaro.



# Abonu *Kurieron*

*UNESKO-Kuriero* estas eldonita en la ses oficialaj lingvoj de UN, kaj ankaŭ en la kataluna kaj Esperanto.



















***Abonu la presitan version en ĉiu trimonato***

***aŭ***

***abonu 100% senpage la bitversion.***

***Malkovru niajn ofertaĵojn***

**http://www.espero.com.cn/; http://esperanto.china.org.cn; https://www.chinaesperantoligo.com.cn/kuriero//**

**https://en.unesco.org/courier • https://fr.unesco.org/courier**
**https://es.unesco.org/courier • https://ru.unesco.org/courier • https://ar.unesco.org/courier • https://zh.unesco.org/courier**



2025
Internacia Jaro de Konservado de Glaĉeroj

# Internacia Jaro de Konservado de Glaĉeroj

© Adriana Lorena Benavides Estrada / Unsplash

ISSN 2096-9082
CN 10 - 1711/C

**Legu pli:**
**www.un-glaciers.org**